



ESPERANTO

OKTOBRO 1962

55a Jaro - N-ro 682 (10)

esperanto

REVUO INTERNACIA

OKTOBRO 1962

55 a J A R O

N-RO 683 - (10)

Korekto: Ni afable petas ŝanĝi la numeron sur la sept. no. al 682 kaj la numeron sur la kovrilo de tiu ĉi al 683.

Fondinto: H. HODLER

Cion por la redakcio oni sendu al la Redaktoro: W. Auld, 35 Deer Park, Sauchie, Alloa. (Clackmannanshire), Skotlando.

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando, Telefono: (010) 32788. Ĝirkonto: 378964 TELEGRAMADRESO: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ciu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesitaj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represadon al nia redakcio.

Jara abono (1962): 11,50 gld. (kun membreco kaj jarlibro 15,— gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj:

1 paĝo 128,— gld, 1/2 paĝo 64,— gld, 1/4 paĝo 32,— gld, 1/8 paĝo 16,— gld, 1/16 paĝo 8,— gld.

Anoncetoj pri korespondado:

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu du da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en pli ol 80 landoj.

Estraro de U.E.A.:

Prof. D-ro Hideo Yagi, prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes O.B.E., Vic-prezidanto, 38 Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Aalsterweg 217, Eindhoven, Nederlando.

D-ro André Albault, estrarano pri kulturaj aferoj kaj kongresoj, 8 Avenue Etienne Billières, Toulouse, Francujo.

S-ro Z. Czuba, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca 73/100, Warszawa, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

S-ro Sv. Ziegler, helpa sekretario, H. P. Olsens Vaenge 37, Taastrup, Danlando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, Zürich 6/57, Svislando.

LA FRONTPAĜA BILDO:

Prof. D-ro Edmond Privat †

Enhavo

Nekrologo pri Prof. Edmond Privat . . .	169
La signifo de la nova Laborplano de UEA . . .	170
La lasta honoro al Prof. Privat . . .	171
La nova Laborplano de UEA . . .	172
Seminario Oriento-Okcidento . . .	175
La Luziado	176
Literatura Konkurso Luis Hernandez . . .	180
Listo de premiitoj en la Belartaj Konkursoj 1950-1962	181
Kies lingvo estas Esperanto ? . . .	182
Helpinda samideanino . . .	182
Savu niajn librojn ! . . .	182
Rubrikoj	
Ŝaka rubriko . . .	175
La Juna Vivo . . .	178
Ricevitaj libroj	180
Nia forumo	183
48a U.K.	183
Tra la mondo	184
Oficiala informilo	187
Radio	188

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en korekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

OMAGĖ AL PROF. EDMOND PRIVAT

Al la pli fruaj generacioj de esperantistoj la nomo de Edmond Privat havas magian kvaliton. Al ili, li estis unu el la legendaj herooj de la movado, kies morto estas la finiĝo de epoko en ĝia historio.

Li eble estis la sola restanto el la entuziasmaj junuloj kiuj, klare vidante la neceson por faciligi la praktikan uzadon de Esperanto, ĉefe rolis en la fando de U.E.A.

Kiel grandega estas nia ŝuldo al Prof. Privat, la kelkaj detaloj pri lia aferplena vivo vane klopodas montri. Li estis unu el tiuj, kies bonfamo en la mondo estis tia, ke la nura fakto ke ili estas esperantistoj donas prestiĝon al ni.

Aldone al liaj konataj talentoj kiel lingvisto, historiisto, oratoro, verkisto kaj organizanto, lia ĉarma amika sinteno al eĉ la plej neeminentaj inter ni karigis lin al multaj.

Forpasis de ni grandanima idealisto kies juneca fervoro por firme kaj vaste starigi Esperanton neniam estingiĝis. Bedaŭrinde, pro la kruela malsano kiu longe afliktis lin ni pli kaj pli malofte povis renkontiĝi en kongresoj, sed ĉiam lia saĝa konsilo estis je nia servo.

Kun sincera danko ni memoru kaj honoru lin.

H. W. Holmes O.B.E., Vicprezidanto

☆

Prof. Edmond Privat, franclingva sviso, naskiĝis en Ĝenevo la 17an de aŭgusto, 1889. Li doktoriĝis pri historio ĉe Ĝeneva Universitato, kaj fariĝis Profesoro pri angla-usonaj institucioj ĉe la Jura Fakultato de Neuchâtel Universitato. Jam dum la infanjaroj li lernis Esperanton, kaj en 1903 li fondis, kun Hodler, la gazeton "Juna E-isto". En 1905 li partoprenis, kiel 16-jara junulo la Unuan Kongreson en Boulogne-sur-Mer, kie li elokvente alparolis la kongreson. De 1920 ĝis 1934 li redaktis la gazeton "Esperanto", kie liaj klarvidaj, elegantstilaj artikoloj konstante aperis. Inter 1921 kaj 1928 li reorganizis kaj gvidis la internacian movadon, estante Prezidanto de UEA de 1924 ĝis 1928, kaj dum multaj jaroj li estis prezidanto de la Svisa Societo Esperanta. Li reprezentis Esperanton en la Ligo de Nacioj, en la Internacia Laboroficejo kaj la Universala Telegrafa Unuiĝo, kaj li aranĝis internaciajn teknikajn konferencojn en Esperanto: edukistan en Ĝenevo en 1922, komercistan en Venecio en 1923, radian en Ĝenevo en 1926.

Tiuj, kiuj aŭdis lin, memoras lin kiel eminentan oratoron. Tiuj, kiuj ne aŭdis lin, bone konas liajn verkojn, kiuj ampleksas tre diversajn kategoriojn. Li verkis lernolibrojn: "Esperanto at a glance" (1908); "Esperanto in 50 lessons" (1910); kaj lian eterne ŝatatan kaj uzatan "Karlo" (1910 kaj multaj postaj eldonoj); lingvistikon: "Esprimo de sentoj en Esperanto", kiu restas fundamenta tezo pri la temo; historion kaj biografion: "Historio de Esperanto" (Unua parto 1911, Dua parto 1927), kaj "Vivo de Zamenhof" (1920), tradukita en plurajn lingvojn; poezion: "Tra l' silento" (1912, k.a.); dramon: "Ginevra" (1913). Aliaj liaj verkoj estas: "Hector Hodler, lia vivo kaj morto" (antaŭparolo, 1928); "Interpopola konduto" (1934); "Federala sperto" (1958), kaj pluraj aliaj pli fruaj verkoj. En 1960 aperis lia "Junaĝa verkaro" ĉe la eldonejo Stafeto.

Li estis granda pacifisto kaj partoprenis ĉiujn movadojn kiuj iel rilatis al tio. Li estis kvakero kaj admiris Gandhi, kies vivon li bone konis kaj kies teorion de senperforteco li studis kaj akceptis. En la lastaj jaroj li havis kontakton ankaŭ kun Anthony Brooke, kies idealoj iras en sama direkto kaj kiun li kondukis tiel al la Esperanto-movado.

La modernan postmilitan strebadon al mondpaco pere de mondfederacio li tuj akceptis. Li kunfondis la internacian organizaĵon Universala Ligo, kiu propagandas mondfederalismon kaj kies oficiala lingvo estas Esperanto. De la komenco li estis ĝia prezidanto.

Pro lia daŭre progresanta tre doloriga malsano, kiu apenaŭ permesis al li movi sin, post la dua mondmilito liaj aktivecoj por Esperanto kaj liaj kontaktoj kun UEA, kies Honora Prezidanto li estis ekde 1951, estis ĉefa skribaj.

Multe kontaktis lin kaj plurfoje vizitis lin en tiuj jaroj Prof. Lapenna, kiu priparolis kun li i.a. la preparlaborojn por Montevideo. Li estis kunlaboranto de CED ekde ĝia fondiĝo.

Kelkfoje ankoraŭ, malgraŭ la grandaj fizikaj streĉoj, kiujn tio kaŭzis, li ĉeestis Universalan Kongreson, nome en Zagreb, Haarlem kaj Mainz, kaj la esperantistaro tiam povis ankoraŭfoje aŭdi lin kiel oratoron, ĉu en festparolado aŭ dum U.L.-kunveno. Okaze de la 50-jara ekzistado de UEA li donis en memoriga parolado historian superrigardon. Prof. Privat mortis la 28an de aŭgusto, 1962.

LA SIGNIFO DE LA NOVA LABORPLANO DE U.E.A.

La kaŭzoj, kiuj necesigis la ellaboron kaj akcepton de la Dua Baza Laborplano de U.E.A., estas koncize prezentitaj en ĝia Enkonduko. Aldone, ĉi tie ŝajnas utile nur rememorigi per kelkaj vortoj la manieron, laŭ kiu la agadprincipoj de la Laborplano estis diskutataj kaj fine formulitaj en la definitiva teksto.

La unua projekto, farita de la ĝenerala sekretario en la senco de la Art. 30 de la Statuto, estis publikigita en la marta n-ro de "Esperanto". En la akompana artikolo estis donitaj la necesaj klarigoj kaj la Esperanto-organizaĵoj estis petitaj pritrakti la aferon. Dum siaj kunsidoj de la 14-a kaj 15-a de aprilo la Estraro de U.E.A. tre atente diskutis la projekton kaj faris en ĝi kelkajn kompletigojn. Sekvante la inviton de la Estraro, pluraj landaj asocioj, lokaj grupoj kaj unuopuloj siavice sendis diversajn proponojn. Tiu tuta materialo estis transdonita al la Komitato, kiu elektis specialan komisionon por trastudo de la projekto kaj de ĉiuj alvenintaj sugestoj. Paralele kun la laboro de la Komitato kaj de ĝia Komisiono por la Laborplano, la Unua Ĝenerala Kunveno de la U.K. en Kopenhago diskutis la temon **"La Rolo de la Lokaj Grupoj en la Nova Laborprogramo de U.E.A."** La interesiĝo estis vere grandega: ĉeestis pli ol 400 personoj, el kiuj multaj estis reprezentantoj de landaj asocioj kaj lokaj societoj. Laŭ la deziro de la Komisiono por la Laborplano, en kiu estis esprimita opinio, ke la Laborplano de U.E.A. devus ne enhavi erojn pri la landaj asocioj kaj lokaj grupoj, la kunveno unue pritraktis tiun principan demandon. Per grandega plimulto de ĉiuj voĉoj kontraŭ 2 kaj 7 sindetenoj la kunveno decidis, ke la Laborplano enhavu la menciitajn partojn. Post tio la Komisiono povis daŭrigi la studadon de la projekto kaj, rezulte, prezenti al la plena kunsido de la Komitato nombron de ŝanĝoj kaj aldonoj. Kelkaj estis akceptitaj, aliaj aŭ modifitaj aŭ rifuzitaj. Parton post parto, punkton post punkto, eĉ frazon post frazo la supera organo de la Asocio plej atente trapasis la tutan Laborplanon, voĉdonis pri ĉiu unuopa

ero kaj fine revoĉdonis pri la tuto. Tiamaniere la nova Laborplano, akceptita de la Komitato en Kopenhago en la formo nun publikigita, estas elstara rezulto de plej vasta diskutado tra la tuta esperantista mondo kaj esprimas la plej demokrate formiĝintan volon de la neŭtrala Esperanto-Movado, kiun reprezentas Universala Esperanto-Asocio. Estas utile aldoni, ke, tuj post la U.K. en Kopenhago, la Kongreso de T.E.J.O. en Ystad akceptis sian Laborplanon konforme al tiu de U.E.A., kaj ke la pli ol 100 partoprenantoj el 18 landoj de la kultura aranĝo SSS en Frostavallen priparolis en du kunvenoj la plej efikajn metodojn por plenumi la novan Laborplanon precipe sur la nivelo de la lokaj grupoj. La Laborplano de T.E.J.O. estos publikigita kaj la sugestoj de Frostavallen senditaj al ĉiuj landaj asocioj kaj aliaj interesiĝantoj.

La akcepto de la Dua Baza Laborplano de U.E.A. markas la komenciĝon de nova, tre verŝajne decida periodo en la klopodoj ĝeneraligi la uzon de komuna neŭtrala lingvo en ĉiuj internaciaj rilatoj. Senpasia kaj senpartia analizo de la lingva situacio en la hodiaŭa mondo, objektiva juĝo pri la aktuala kaj potenciala pure lingva kapacito de la Internacia Lingvo, trankvila takso de la teknika-organiza aparato je dispono de la nuntempa Esperanto-Movado pravigas la fidon, kiu inspiras la novan Laborplanon. Necesas nun, ke ĉiuj Esperanto-organizaĵoj kaj ĉiuj esperantistoj insiste klopodu realigi ĝin kun la sama fido en amika kunlaborado, ĉar sole per komunaj fortoj estas atingebla la celo. Por helpi la plenumon de la Laborplano, la revuo "Esperanto" — kaj espereble ankaŭ la aliaj periodaĵoj — publikigos serion da artikoloj kun analizoj de la unuopaj punktoj, konsiloj pri la metodoj aplikendaj, instigaj informoj pri la progresoj faritaj. Provizore, en tiu ĉi komenca stadio, sufiĉos atentigi pri kvar ĝeneralaj trajtoj por eviti ĉian eblan miskomprenon rilate la signifon de la Laborplano.

La lasta honoro al Prof. Privat

Kvankam ni estis anoncintaj, ke S-ro H. W. Holmes O.B.E., vic-prezidanto de U.E.A. kaj malnova amiko de Prof. Privat, flugos el Londono por ĉeesti la cindrigan ceremonion, tio tamen ne okazis, ĉar survoje al la flughaveno S-ro Holmes fariĝis malsana kaj devis reveni hejmen. Post telefona kontakto, oficiale reprezentis tial U.E.A. S-ro J. J. Sturzenegger, nia svisa komitatano. Kakero gvidis la ceremonion, por kiu ĵaŭdon la 30-an de aŭgusto je la 14-a horo kolektiĝis ĉirkaŭ 160 personoj en la krematoria preĝejo. Pro granda nombro da parolantoj nek la reprezentanto de U.E.A., nek la prezidanto de la Svisa Esperanto-Societo povis ricevi vicon inter ili. Post la ceremonio, kiu daŭris unu horon, Sinjorino Privat akceptis la ĉeestantojn kaj tiam S-ro Sturzenegger persone esprimis al ŝi la grandan bedaŭron kaj sinceran kondolencon de U.E.A. Konforme al la kutimoj en la familio, la cindro de la eminenta forpasinto estis disĵetita sur la Lago de Ĝenevo.

Inter la florkronoj troviĝis ankaŭ unu sendita de U.E.A. Poste, kelkaj esperantistoj deponis parton de la florkronoj sur la tombon de Hector Hodler, fondinto de U.E.A., gesto kiu sendube estis laŭ la spirito de Prof. Privat, kiu dum multaj jaroj estis persona amiko kaj kunlaboranto de Hector Hodler.

Unue, estas utile emfazi, ke neniue serioza laborplano — speciale ne laborplano de socia-kultura movado kiel la nia — celas antaŭvidi ĉiujn detalojn de la estonteco. La Laborplano de U.E.A. devas esti rigardata ne kiel ia profetaĵo, sed kiel vasta kadro de agado, kiu, surbaze de la objektivaj taskoj, indikas la finan celon, la konkretajn plenumendajn taskojn, la vojon sekvotan kaj la ĉefajn metodojn aplikindajn. Pro tiu esenca karakterizo la Laborplano detaligas ĝis certa grado nur la taskojn de la centraj organoj de la Asocio, dum la punktoj rilatantaj al la landaj asocioj, lokaj grupoj kaj fakaj organizaĵoj estas intence tiel formulitaj, ke ili prezentas nur la plej ĝeneralan framon por la estonta laboro. Estas urĝe necese, ke nun ĉiuj Esperanto-organizaĵoj, apartenantaj rekte aŭ nerekte, en tiu aŭ alia formo al U.E.A.,

detaligu en siaj laborplanoj tiujn fundamentajn taskojn, prenante en konsideron la apartajn landajn, regionajn kaj lokajn kondiĉojn, aŭ la specialajn cirkonstancojn de siaj fakaj medioj.

Due, kvankam la Laborplano konsistas el kvin partoj, 28 punktoj kaj multaj eroj, tamen ĝi prezentas unuecan tuton. Ne ekzistas taskoj pli gravaj kaj malpli gravaj. Ili ĉiuj estas same gravaj. Nur la plenumo de ĉiuj punktoj sur ĉiuj niveloj — monda, landa, regiona — loka kaj faka — garantias la sukceson.

Trie, parto de la programaj eroj ŝajnas tiel memkompreneblaj, ke oni povus demandi sin ĉu necesis meti ilin en la Laborplanon. Se ĉiuj niaj organizaĵoj estus efektive ĉiam agintaj laŭ tiuj "memkompreneblaj" principoj, eble oni estus povinta ellasi ilin. Bedaurinde multaj agadprincipoj, kiuj estis kaj estas memkompreneblaj por unuj, tute ne estas ankoraŭ atentataj de aliaj. Pro la fakto, ke precize tiuj "memkompreneblaj" principoj formas unu el la nediskuteblaj antaŭkondiĉoj de kiu ajn pozitiva laboro por la Internacia Lingvo, ili estis enmetitaj en la Laborplanon kaj restis en ĝi.

Fine, dum la diskuto kelkaj starigis la demandon ĉu la Laborplano havas devigan karakteron por ĉiuj, inkluzive la organizaĵojn kaj la individuajn membrojn, el kiuj konsistas U.E.A., aŭ ĝi estas deviga nur por la centraj organoj de la Asocio. Se oni komprenas la vorton "deviga" en la senco de perforta altrudo kun la helpo de ĝendarmoj, tiam evidente la Laborplano estas "deviga" por neniue. Sed se oni korekte konceptas la kaŭzojn, celojn kaj metodojn de organizita laboro entute, tiam la Laborplano, akceptita de la Komitato laŭ la Statuto kaj post vastega diskuto, estas morale deviga por ĉiuj: almenaŭ tiom, kiom estas la Statuto kaj la Regularoj de la Asocio. Se ne estus tiel, ĝi estus komplete superflua. Estas, ja, pli ol klare, ke nek la ok personoj de la Estraro, nek la sesdeko da Komitatanoj povas solaj plenumi tiun grandiozan agadprogramon. Nur la tuta U.E.A., hodiaŭ pli potenca ol iam antaŭe, kapablas tion fari. Kaj nur la konvinko, ke ĉiuj organizaĵoj kaj ĉiuj unuopuloj en la kadro de U.E.A. sincere klopodos efektiviĝi sian parton aŭ nur ereton de la Laborplano, povas doni al ĉiu el ili la necesajn kuraĝon kaj fidon en la plenumado de la propra tasko en la propra medio. Ne nur ĉiuj partoj, punktoj kaj eroj de la Laborplano estas reciproke tiel kunligitaj, ke malatento al unu malutilas al la tuto kaj povas eĉ endanĝerigi ĝin, sed, ĝuste tial, ankaŭ la personoj respondecaj por la plenumo dependas unu de la alia kiel ĉeneroj en longa ŝtala ĉeno.

Konsciaj pri tiuj interligiteco kaj interdependeco ni komencu senprokraste realigadi la Duan Bazan Laborplanon de U.E.A.!

Ivo Lapenna

DUA BAZA LABORPLANO DE U.E.A.

I. ENKONDUKO

1. **Laborplano 1955** : La konataj decidoj de UNESCO fine de 1954 necesigis sistemigon de la laboro de U.E.A. kaj de ĉiuj organizaĵoj apartenantaj al ĝi en tiu aŭ alia formo. Tiucele estis ellaborita la Baza Laborplano de U.E.A. kaj prezentita al la Komitato, kiu akceptis ĝin dum la Kongreso de Bologna en la jaro 1955. Ĝi estis la unua Laborplano de la Asocio kaj ĝi ebligis celtrafan agadon en la periodo 1955-1962.

2. **Plenumo** : La Raportoj de la Estraro por la laborjaroj 1955/1956 ĝis 1961/1962, publikigitaj en la Jarlibro, entenas la ĉefajn atingojn de la Asocio kaj ĝenerale de la Esperanto-Movado en la menciita periodo. Kelkaj eroj de la Plano ne povis realiĝi, ĉefe pro kaŭzoj ekster la povo de la respondecaj organoj de U.E.A., sed, aliflanke, multaj aliaj punktoj, neantaŭviditaj en la Plano, povis esti sukcese plenumitaj. Ĝenerale parolante, la ĉefa celo de la plano estas atingita. Ekstere la pozicioj de la Internacia Lingvo konsiderinde pliboniĝis kaj la prestiĝo de U.E.A. kiel reprezentanto de la neŭtrala Esperanto-Movado multe altiĝis. Interne la Asocio fortiĝis organize kaj ideale. Rezulte la membraro preskaŭ duobliĝis. Pro la plenumo de la taskoj antaŭviditaj en la Unua Baza Laborplano, kiel ankaŭ pro la ŝanĝitaj cirkon-Unua Baza Laborplano, kiel ankaŭ pro la ŝanĝitaj cirkonstancoj en la mondo, necesas fiksi en nova Baza Laborplano la principojn de agado en la sekvanta periodo.

II. CELO

3. **Premisoj** : Ĉiu, kiu objekte rigardas la realaĵon en la hodiaŭa mondo, facile povas konstati, ke la homaro ĉiam pli kaj pli bezonas rimedon de komunikado por ĉiuj internaciaj rilatoj, daŭre ampleksiĝantaj kaj profundigantaj. Estas same klare, ke tiun bezonon povas plene kontentigi nek unu aŭ pluraj naciaj lingvoj, nek la nuntempaj sistemoj de tradukado kaj interpretado, nek la plej modernaj tradukmaŝinoj, sed sole vivanta, ĝis maksimumo nuancita, plensanga kultura lingvo. Bazante sin sur tiuj du premisoj kaj konante perfekte la nunan evolustadion de la Internacia Lingvo kaj ĝiajn senfinajn evolu-eblecojn, la organizita Esperanto-Movado estas konvinkita, ke precize la Internacia Lingvo prezentas la solvon de la lingva problemo en mondaj kadroj kaj ke tial pli aŭ malpli frue devas veni la tempo kiam ĝi estos aplikata en ĉiuj internaciaj rilatoj, sur ĉiuj niveloj.

4. **Organizita agado** : Rezulte, necesas, unuflanke, daŭre evoluigadi la Internacian Lingvon rigore konservante kaj fortikigante la lingvounuecon, por ke en ĉiu momento ĝi povu kontentigi ĉiujn bezonojn de internacia komunikado, kaj, aliflanke, konscie, organizite kaj paralele vastigi la scion kaj la praktikajn aplikojn de la lingvo en ĉiuj sferoj. Malfacile oni povas antaŭvidi kiam precize la utiligo de la Internacia Lingvo ĝeneraliĝos, ĉar tio dependas de multaj faktoroj, el kiuj la plej granda parto troviĝas tute ekster la atingopovo de la Esperanto-Movado, sed tute certe la kondiĉoj por tio ĉiam pli maturiĝos. Tial estas eble almenaŭ ĝis certa grado influi la solvon kaj plirapidigi la procezon per konsiderinda altigo de la nombro de personoj mastrantaj la lingvon, kio aŭtomate vastigas la kampon de ĉiaspecaj praktikaj aplikoj kaj, krome, ebligas ankaŭ konscian vastigon de tiuj praktikaj utiligoj. Siavice tio devas plimultiĝi kaj fortikigi ĉiujn Esperanto-organizaĵojn, sekve ebligi novajn agadojn kaj intervenojn kun pli da efiko, kio ne povas ne reflektiĝi en la plua disvastigado de la lingvo. Ĉio ĉi estas firme kunligita, sed estas necesa la elemento de konscie organizita agado por sukcesplene rapidigi la funkciadon de tiu maŝinaro de reciproka influado. La nova Baza Laborplano plenumas tiun taskon. Ĝi prezen-

tas komunan framon por la agado de ĉiuj organoj de U.E.A., de la aliĝintaj asocioj, de la kunlaborantaj fakaj kaj specialigitaj organizaĵoj, de la lokaj societoj kaj unuopaj membroj. Ĝi montras la vojon al la fina celo — la ĝeneraligo de la uzo de Esperanto en la internaciaj rilatoj — la internajn kaj eksterajn taskojn plenumendajn en la nuna stadio, kaj la labormetodojn aplikendajn por efike proksimiĝi al tiu celo.

III. INTERNAJ TASKOJ

A. U.E.A.

5. **Organiza plifortigo** : (a) Instigi al aliĝo al U.E.A. ĉiujn landajn kaj fakajn asociojn; (b) plifortigi la landajn kaj fakajn asociojn. Iniciati kaj helpi la organizon de novaj; (c) konsiderinde altigi la nombron de individuaj membroj, laŭ la ebleco minimume al 15.000; (ĉ) altigi la nombron de asociaj membroj laŭ ebleco al minimume 35.000; (d) utiligi la kategoriojn de "apogantoj" kaj "apogantaj organizaĵoj" por havigi al U.E.A. la subtenon de simpatiantaj organizaĵoj kaj almenaŭ 50.000 unuopaj apogantoj; (e) fortigi T.E.J.O. kaj doni al ĝi efikan helpon en la disvastigo de la Internacia Lingvo inter la junularo; (f) duobligi la nombron de delegitoj kaj fakaj delegitoj; (g) nepre atingi pli fortan internan disciplinon, tiel ke ĉiu organo, funkciulo aŭ oficisto de la Asocio plenumu precize, akurate kaj ĝustatempe siajn taskojn kaj devojn kaj ke, aliflanke, laŭ la dezirindeco, la unuopaj lokaj grupoj kaj individuaj membroj turnu sin unuavice al siaj respektivaj landaj aŭ fakaj asocioj, komitatanoj kaj lokaj organizaĵoj, senŝarĝante tiamaniere la centrajn organojn de laboroj, kiuj apartenas al la landaj asocioj, fakaj organizaĵoj aŭ lokaj grupoj; (ĝ) plene ordigi la novan domon en Rotterdam, ankoraŭ modernigi la oficejon per nuntempaj oficejaj instrumentoj, eventuale per malgranda moderna presmaŝino por publikigo de diversaj bultenoj kaj informaj materialoj; (h) instigi donacadon por unuopaj ĉambroj en la domo (5000 ned. gld.), kiuj ricevos nomon laŭ la deziroj de la donacintoj; (ĥ) oridigi kaj daŭre kompletigadi la bibliotekon tiel ke ĝi estu maksimume ĝisdata.

6. **Informado** : (a) Intensigi la agadon surbaze de la Principaro de Frostavallen (vidu la Jarlibron de U.E.A., 1959, p. 186), kiu formas konsistan parton de tiu ĉi Laborplano; (b) dediĉi precipan atenton al agado en Azio kaj Afriko (specialaj broŝuroj, flugfolioj, prelegoj, havigo de instruistoj, lernolibroj, fondo de grupoj kaj landaj asocioj); (c) instigi la landajn asociojn kaj lokajn grupojn realigi la ideojn kaj sugestojn, kiujn entenas la Principaro de Frostavallen; (ĉ) instigi la interŝanĝadon de spertoj; (d) aranĝi konferencojn de la informaj fakoj kaj specialistoj pri informado kun la celo daŭre plibonigadi la enhavon kaj metodojn de informado.

7. **Lingvo** : (a) Rigore konservi kaj fortikigi la lingvounuecon surbaze de la Zamenhofa Fundamento klare distingante inter la necesa aŭ utila evoluigo de Esperanto kaj la danĝera deformado de ĝiaj bazaj strukturaj trajtoj laŭ la Fundamento; (b) atenti, ke ĉiuj publikaĵoj de U.E.A. estu absolute senriproĉaj el lingva vidpunkto; (c) kritike rilati al ĉio, kio malaltigas la lingvan nivelon; (ĉ) konservi kaj konscie intensigi la vivantecon de la lingvo per instigoj al uzado de Esperanto ne nur okaze de internaciaj renkontiĝoj, sed en ĉiuj Esperanto-organizaĵoj, iliaj organoj kaj inter unuopuloj; (d) ankoraŭ plibonigi la nivelon de la lingvo-instruado per organizo de internaciaj kursoj por kursgvidantoj; kontrolado de lernolibroj kaj rigora kritiko de lernolibroj kaj vortaroj, kiuj deformas la lingvon; publikigado de lernolibroj por lingvoj, en kiuj ili ankoraŭ ne ekzistas; kunligado de lernejoj en kiuj la Internacia Lingvo estas instruata; instigado al

organizo de konversaciaj kursoj; aligado de la kursfinintoj al Esperanto-organizaĵoj, inkluzive U.E.A.; plua evoluigo de la internaciaj ekzamenoj kaj instigado al diplomiĝo.

8. **C.E.D.**: Nepre konservi kaj fortikigi C.E.D. kiel specialan scienca-esploran institucion de la Esperanto-Movado.

9. **Kongresoj kaj konferencoj**: (a) Plue evoluigi la U.K. konservante la nunan bazan strukturon, tiel ke ili fariĝu ĉiam pli atentataj mondaj kulturaj manifestacioj; (b) ligi al U.K. specialajn aranĝojn, ekzemple artajn festivalojn, konferencojn de sciencistoj aŭ teknikistoj, kiam ajn la cirkonstancoj tion permesas; (c) organizi aŭ helpi la organizon de kiel eble plej multaj internaciaj konferencoj de specialistoj, seminarioj, diskutrondoj kaj similaj aranĝoj, en kiuj estas traktataj internacie interesaj problemoj, kaj utiligo de tiaj aranĝoj ankaŭ por informado en neesperantistaj fakaj medioj; (ĉ) rekomendi, kuraĝigi kaj aŭspicii internaciajn renkontiĝojn kun kultura programo ekster la loko kaj tempo de la Universala Kongreso.

10. **Publikadoj**: (a) Ampleksigi kaj paralele plibonigi la revuon "Esperanto"; (b) daŭrigi la eldonadon de la Jarlibro en du partoj kaj ampleksigi ĝin paralele kun la nombrokresko de individuaj membroj kaj delegitoj; (c) publikigi almenaŭ trifoje jare altnivelan kulturen revuon; (ĉ) daŭrigi la eldonadon de fakvortaroj, sed pli atenti al la kvalito; (d) instigi eldonadon de antologioj de diversaj naciaj literaturoj en Esperanta traduko, aŭ mem eldoni tiajn antologiojn; (e) daŭrigi la serion "Oriento-Okcidento"; (f) eldonadi aliajn elstarajn tradukajn aŭ originalajn verkojn kaj morale apogadi ĉiujn eldonistojn, kiuj publikigas valorajn verkojn en la Internacia Lingvo, precipe teknikajn, fakajn kaj popularsciencajn legaĵojn.

11. **Specialaj kulturaj agadoj**: (a) Daŭrigi I.S.U. kaj, se iel eble, organizi almenaŭ de tempo al tempo memstarajn sesiojn ekster la U.K.; (b) daŭrigi kaj plibonigi la belartajn kaj oratorajn konkursojn; (c) instigi precipe la lokajn societojn utiligi pli vaste la magnetofonan servon; (ĉ) vastigi la korespondan servon kaj ligi ĝin al aliaj organizaĵoj, kiuj prizorgas internacian korespondadon, tiel ke Esperanto fariĝu unu el la korespondaj lingvoj uzataj ankaŭ ekster la Esperanto-Movado; (d) nepre plibonigi la filman servon kaj kuraĝigi la produktadon de filmoj en Esperanto; (e) helpi la vastigon de la uzo de Esperanto en la radio kaj en la eldonado de diskoj kaj de sonbendoj kun diapozitivoj; (f) instigi la utiligon de Esperanto por resumoj de libroj, studoj kaj artikoloj precipe kun scienca kaj faka karaktero; (g) kuraĝigi la uzon de Esperanto en komerco kaj trafiko; (ĝ) organizi internaciajn prelegvojaĝojn de kompetentaj prelegantoj-esperantistoj; (h) utiligi ĉiujn eblecojn por vastigi la uzon de Esperanto en la medioj de scienco, edukado kaj kulturo; (ĥ) plue apogi la agadon de la Internacia Arta Teatro.

B. Landaj Asocioj, Lokaj Societoj, Fakaj Organizaĵoj

12. **Landaj Asocioj**: Konforme al tiu-ĉi Baza Laborplano, prenante en konsideron la landajn cirkonstancojn kaj eblecojn, ĉiu Landa Asocio ellaboru propran konkretan programon kun aparta konsidero de jenaj taskoj: (a) organize plifortigi la Landan Asocion, altirante al ĝi la multnombrajn malnovajn esperantistojn kaj membrigante novajn (tiucele informi ilin interalie ankaŭ pri la Baza Laborplano de U.E.A. kaj de la koncerna L.A.); (b) aliĝi senprokraste al U.E.A., se la koncerna L.A. ankoraŭ ne estas aliĝinta asocio; (c) en kunlaboro kun la Ĉefdelegito, se tia ekzistas, varbi kiel eble plej multajn individuajn membrojn de U.E.A.; (ĉ) instigi la individuajn membrojn de U.E.A. fariĝi Delegitoj, Vicdelegitoj kaj Fakdelegitoj, precipe por la plej gravaj fakoj rilatantaj al scienco, edukado kaj kulturo; (d) organizi aŭ helpi organizon de L.A. en najbaraj landoj, en kiuj ankoraŭ ne ekzistas L.A.; (e) formi junularajn sekciojn kaj altiri la plej kapablajn gejunulojn en la gvidajn organojn de la L.A.; (f) helpi la ekzistantajn lokajn grupojn kaj fondi

novajn; (g) formi Informan Fakon, se tia ankoraŭ ne ekzistas, laŭ la Principaro de Frostavallen kun aparta atento al disvastigo de la Internacia Lingvo en la universitatoj, lernejoj kaj ĝenerale inter la junularo; (ĝ) organizi tutlandajn korespondajn kursojn, radio-kursojn kaj kursojn en nacilingvaj gazetoj; (h) uzi ĉiam la Internacian Lingvon ne nur en kongresoj, konferencoj, kunsidoj kaj kunvenoj, sed ankaŭ ekster la oficialaj aranĝoj inter esperantistoj; (ĥ) enhave plibonigi la landan organon kaj publikigi ĝin laŭ ebleco nur en la Internacia Lingvo (por agado inter neesperantistoj oni eventuale eldonu specialan nacilingvan bultenon); (i) helpi ĉiurilate la centrajn organojn de U.E.A. en la realigo de la Baza Laborplano; (j) krei i.a. instancojn por lingvoscienco, kiuj prizorgu la plialtigon de la lingvonivelo de la landa esperantistaro, la plibonigon de la instruado, de la lernolibroj, la trastudon de lingvaj problemoj rilatantaj, unuflanke, al malutilaj influoj de la naciaj lingvoj kaj, aliflanke, al la neceso krei internacilingvajn esprimojn por specifaj nacilingvaj vortoj kaj esprimoj.

13. **Lokaj Societoj**: Konforme al tiu-ĉi Baza Laborplano kaj la Laborplano de la L.A., se ĝi ekzistas, ĉiu Loka Societo ellaboru propran konkretan laborplanon kun aparta konsidero de jenaj taskoj: (a) organiza plifortigo de la societo, speciala kampanjo por membrigi malnovajn esperantistojn, kiuj troviĝas ekster la societo, aligi novajn; (b) se iel eble havigi propran ejon kaj, en ĉiu okazo, propran bibliotekon, aboni la landan organon, la revuon "Esperanto" kaj kelkajn aliajn internaciajn revuojn; (c) starigi daŭran korespondan kontakton kaj laŭeble vizitojn kun konvena nombro de eksterlandaj societoj; (ĉ) organizi junularan sekcion aŭ apartan junularan grupon; (d) formi landan asocion, se ĝi ankoraŭ ne ekzistas; (e) aligi ĉiujn siajn membrojn al la L.A. kaj varbi kiel eble plej multajn individuajn membrojn por U.E.A.; (f) prizorgi, ke en la loko de la societo kaj en la apudaj lokoj estu D de U.E.A., eventuale VD kaj kiel eble plej multaj FD precipe por la plej gravaj fakoj de scienco, edukado kaj kulturo; (g) organizi aŭ helpi la organizon de Loka Societo en la apudaj lokoj; (ĝ) organizi Informan Fakon laŭ la Principaro de Frostavallen kaj aparte atenti la agadon en lernejoj kaj ĝenerale inter la junularo (en universitataj urboj nepre vastigi la informadon en la universitato); (h) organizi konstantajn kursojn por komencantoj (intensa reklamado antaŭ la kursoj) kaj progresintoj; (ĥ) membrigi la kursfinintojn al la L.S., L.A. kaj U.E.A.; (i) en pli grandaj urboj formi aŭ sekciojn aŭ novajn societojn (la spertoj montras, ke la granda plimulto de la L.S. atingas 60-80 membroj, malofte ĝis 300, kio necesigas la fondon, en tiuj urboj, de novaj sekcioj aŭ societoj ĉu laŭ teritoria kriterio — urba kvartalo — ĉu laŭ profesia aŭ faka: junularo, studentoj, laboristoj, intelektuloj aŭ similaj grupoj; (j) okazigi regulajn ĉiusemajnajn kunvenojn kaj konsiderinde plibonigi la programojn (prelegoj de la membroj, interŝanĝo de prelegoj kun eksterlandaj grupoj utiligante tiucele ankaŭ la Magnetofonan kaj Filman Servojn de U.E.A., literaturaj vesperoj; programoj konforme al la kunlaborado de U.E.A. kun Unesko, precipe rilate al la projekto Oriento-Okcidento; amatora teatra trupeto kaj kanthoro, vivaj gazetoj, lumbildaj prezentadoj, partopreno en la organizo de prelegvojaĝoj, dancvesperoj, amuzoj kaj aliaj distraĵoj, konstanta lingva kritiko kun la celo daŭre altigadi la lingvan nivelan); (ĵ) senescepta kaj senkompromisa uzado nur de la Internacia Lingvo por ĉiuj aranĝoj de la L.S., inkluzive la komitatajn kunsidojn; (k) helpi al la organoj de la L.A. kaj de U.E.A. realigi la Bazan Laborplanon kaj la Planon de la L.A.; (l) instigi esperantistojn eniri en diversajn mediojn kie Esperanto povas esti utiligata por internaciaj kontaktoj. Tie disvastigi Esperanton kaj fondi grupojn.

14. **Fakaj Organizaĵoj**: Konforme al la Baza Laborplano ĉiu faka kaj specialigita organizaĵo ellaboru sian propran konkretan programon kun aparta konsidero al jenaj taskoj: (a) organize plifortigi la koncernan F.O.

laŭ la eblecoj krei landajn sekciojn, kaj lokajn grupojn se tiaj ankoraŭ ne ekzistas); (b) aliĝi al U.E.A. laŭ art. 14 de la Statuto, se la koncerna F.O. plenumas la kondiĉojn; (c) instigi la membrojn aliĝi al U.E.A. kiel individuaj membroj kaj fariĝi FD por siaj respektivaj fakoj; (ĉ) organizi fakajn internaciajn renkontiĝojn ne nur dum la U.K. sed ankaŭ ekster ili; (d) eldoni presitan fakan revuon aŭ pligrandigi kaj plibonigi ekzistantan, aŭ publikigi almenaŭ multobligitan fakan bultenon; (e) daŭre evoluigadi la fakan terminaron kaj eldoni kiel eble plej kompletan kaj modernan fakan terminaron, eventuale en la kunlaboro kun la centraj organoj de U.E.A.; (f) doni helpon al la centraj organoj de U.E.A. en la realigo de tiuj punktoj en la Baza Laborplano, kiuj interesas la koncernan F.O.

IV. EKSTERAJ TASKOJ

A. U.E.A.

15. **UNESKO kaj U.N.:** Utiligi ĝis maksimumo la eblecojn de la ĵus akirita nova pozicio (kategorio B) en la konsultaj rilatoj kun UNESKO por efike kunlabori kun tiu Organizaĵo kun U.N. en ĉiuj aferoj, kiuj interesas la Esperanto-Movadon kaj en kiuj ĝi povas doni realan helpon al la plenumo de diversaj agadoj de UNESKO kaj U.N., tute speciale en la Granda Projekto "Oriento-Okcidento"; en la projekto koncernanta la antaŭenigon inter la junularo de la idealoj de paco, reciproka respektado kaj interkompreniĝo de la popoloj; en la agado en Afriko; disvastigo de la celoj kaj idealoj de UNESKO kaj U.N.; eldonado de klerigaj materialoj de UNESKO en la Internacia Lingvo; aktiva partoprenado en la konferencoj de UNESKO kaj en diversaj kunvenoj, seminarioj kaj aliaj aranĝoj organizitaj de UNESKO kaj U.N.

16. **Eŭropaj Institucioj:** Intensigi la klopodojn ĉe ĉiuj eŭropaj organizaĵoj kaj institucioj por la solvo de la lingva problemo de Eŭropo.

17. **Aliaj Regionaj Organizaĵoj:** Iniciati agadon, ĉiam kun la celo solvi la lingvan problemon, simile al la agado en Eŭropo, ankaŭ ĉe aliaj gravaj interŝtataj regionaj organizaĵoj.

18. **Specialigitaj Organizaĵoj:** Daŭre kontaktadi ĉiujn registarajn specialigitajn organizaĵojn kaj atentigadi pri la solvo de la lingva problemo per la Internacia Lingvo (unu el la ĉefaj taskoj de CED).

19. **U.I.A.:** Konservi kaj plifirmigi la rilatojn kun la Unio de Internaciaj Asocioj, liveri al ĝi la necesajn dokumentojn kaj aliajn materialojn pri la Internacia Lingvo, aktive partoprenadi en diversaj laboroj de U.I.A.

20. **Aliaj NRO:** Konservi kaj intensigi la bonajn rilatojn kun ĉiuj neregistaraj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun UNESKO, precipe kun tiuj de kategorio A kaj B.

21. **Lernejoj:** (a) Daŭrigi kaj vastigi la kampanjon "Esperanto kiel Baza Lingvo"; (b) daŭrigi la klopodojn vastigi la instruadon de Esperanto en la lernejoj; (c) paralele daŭrigi la kampanjon por subskribo de Interŝtata Konvencio pri laŭgrada paralela deviga enkonduko de Esperanto en difinitan nombron da lernejoj de la landoj, kiuj aliĝos al la Konvencio; (ĉ) informadi la Sekretariaton de UNESKO pri la progresoj sur tiu-ĉi kampo en la senco de la Rezolucio de la 10-a de decembro 1954; (d) apogi la agadon "Grajnoj en Vento", laŭ ebleco eldonadi apartan internacian gazeton por lernejoj 4-fojojn jare; (l) organizi aŭ helpi la organizon de konferencoj de instruistoj kaj gelernantoj, laŭ la ebleco sub la aŭspicioj de UNESKO. (Vidu ankaŭ la p-ton 7).

22. **Azio:** (a) Utiligi la U.K. en Tokio kaj la Olimpiajn Ludojn en 1964 en la sama urbo por vasta informado pri la Internacia Lingvo en ĉiuj landoj de Azio; (b) utiligi la ekzistantajn landajn asociojn kaj la novekreitajn kernojn en Hindujo kaj Nepalo por plua disvastigo de la lingvo en ĉiuj aziaj landoj; (c) helpi la instruadon per subvencioj, almenaŭ plej modestaj, al instruistoj de Esperanto en tiuj landoj. (Vidu ankaŭ p-ton 6).

23. **Afriko:** Utiligi la "Karavanon de Amikeco", organizitan de Lic. Tibor Sekelj, por vasta informa laboro en ĉiuj landoj, kiujn vizitos la ekspedicio, per (a) prelegoj fare de la membroj de la ekspedicio; (b) distribuo de aparta broŝuro kaj diversaj flugfolioj; (c) artikoloj en gazetoj kaj revuoj; (ĉ) en gravaj kazoj havigo de dokumentoj de CED; (d) helpo rilate sendon de kvalifikitaj instruistoj en interkonsento kun la registaroj de la respektivaj landoj, se por tio maturiĝos la kondiĉoj; (e) okazigo de U.K. (Vidu ankaŭ p-ton 6).

24. **Latina Ameriko:** (a) Fortikigi la jam ekzistantajn landajn asociojn kaj kun ilia helpo fondi novajn; (b) okazigi unu el la sekvantaj U.K. en grava centro de Suda Ameriko post kiam la lingvo estos sufiĉe disvastiĝinta sur tiu kontinento.

B. Landaj Asocioj, Lokaj Societoj, Fakaj Organizaĵoj

25. **Landaj Asocioj:** Antaŭvidi en la programo de ĉiu L.A. precipe jenajn taskojn: (a) reprezentiĝi en la Nacia UNESKO-Komisiono aŭ almenaŭ kunlabori kun ĝi; (b) kunlabori kun la landa asocio por U.N., se tia ekzistas; (c) partopreni en ĉiuj manifestacioj okaze de la Tago de U.N., Tago de la Homaj Rajtoj kaj similaj datrevenoj; (ĉ) kunlabori kun la landaj sekcioj aŭ landaj organizaĵoj de internaciaj organizaĵoj, kun kiuj U.E.A. kunlaboras sur internacia nivelo; (d) realigi kiel eble plej efikan kunlaboradon kun landaj edukaj, sciencaj, ĝenerale kulturaj kaj sociaj organizaĵoj kaj institucioj, helpante al ili korespondi per Esperanto kun parencaj organizaĵoj en eksterlando; (e) helpi al la mondaĵ kampanjoj de U.E.A. laŭ specialaj planoj por la unuopaj kampanjoj.

26. **Lokaj Grupoj:** Antaŭvidi en la plano eksterajn agadojn, adekvatajn al tiuj de U.E.A. kaj la L.A. nur, kompreneble, en lokaj kadroj.

27. **Fakaj Organizaĵoj:** Antaŭvidi en la programo de ĉiu F.O. precipe jenajn taskojn: (a) aliĝi al la samfaka neesperantista organizaĵo (elekti la plej konvenan, se ekzistas pluraj) aŭ almenaŭ trovi plej taŭgajn formojn de kunlaborado kun tiaj organizaĵoj; (b) publikigi studojn kaj artikolojn en nacilingvaj fakaj periodaĵoj; (c) publikigi Esperantlingvajn artikolojn aŭ prizorgi Esperantlingvajn resumojn en nacilingvaj libroj kaj periodaĵoj; (ĉ) enkonduki la Internacian Lingvon kiel oficialan pontolingvon aŭ unu el la oficialaj lingvoj en internaciajn fakajn konferencojn; (d) efike kunlabori kun la centraj organoj de U.E.A. sur la kampo de enkonduko de Esperanto en fakajn mediojn.

V. KONKLUDO

28. **Centrigo kaj Malcentrigo:** Tiu-ĉi Laborplano estas bazita sur la fundamenta principo centrigo ĝis maksimumo la klopodojn al difinitaj celoj kaj malcentrigo la agadon mem ĝis la plej vastaj bazoj de la organizita Esperanto-Movado. Ne nur la centraj organoj de U.E.A., sed ankaŭ ĉiuj organizaĵoj apartenantaj al ĝi kaj ĉiu unuopa membro devas scii kien oni iras kaj kiujn celojn oni deziras atingi. Sciante tion, ĉiu organo de la Asocio kaj de la unuopaj organizaĵoj, kiel ankaŭ ĉiu individua membro, povos doni efikan helpon en plena konscio, ke agante sur unu el la niveloj — internacia, landa, loka aŭ faka — li kontribuas al la ĝenerala progresigo de la Internacia Lingvo. Ĉiuj eroj de la programo estas same gravaj kaj dependas unu de la alia. Ankaŭ la laboro sur kiu ajn nivelo, en kiu ajn en la organoj aŭ organizaĵoj, estas egale grava. Nur sukcesa plenumo de ĉiuj eroj garantias la sukcesan realigon de la Laborprogramo kiel tia kaj rezulte la proksimiĝon al la fina celo aŭ eĉ ĝian atingon en la proksima estonteco. Krome, sed certe ne malpli signifite, la plena realigo de la Laborprogramo kaŭzos en ĉiu okazo, ke la lingvo estos multe pli vaste uzata ĉie en la mondo kaj tial la scio de Esperanto donos pli grandan utilon al ĉiu unuopulo; kaj paralele altiĝos la socia valoro de la Internacia Lingvo.

SEMINARIO ORIENTO-OKCIDENTO

Por la kvina fojo en deko da jaroj Sveda Somera Semajno okazis en Frostavallen de la 12-a ĝis 19-a de Aŭgusto 1962.

Pli ol 100 partoprenantoj el 18 nacioj de tri kontinentoj kunvenis por aŭskulti kvar eminentajn paroladistojn, kiuj prezentis serion de 15 prelegoj pri kaj ĉirkaŭ la laboroj de Unesko kaj ties Granda Projekto Oriento-Okcidento.

Prof. D-ro Ivo LAPENNA, Londono, bildigis por ni la nunan staton de la ĉefaj laboroj de tiu potenca internacia organizaĵo kaj havis la okazon montri unuflanke la jam konsiderindan kontribuon de U.E.A. al tiuj laboroj, aliflanke ĝian eminentan pozicion apud Unesko: la konsultan pozicion B, kiun ĝi akiris sen ia ajn diskuto kun nur dudeko da aliaj neregistaraj organizoj; aliaj organizoj poste devis diskuti por akiri tian pozicion.

Prof. D-ro Hideo YAGI, Okayama, priskribis laborojn en la kadro de la Granda Projekto Oriento-Okcidento kun tute speciala atento al la japanaj bezonoj kaj vidpunkto. Li ankaŭ priskribis kun helpo de lumbildoj la nunajn morojn de japanoj ĉe kiuj ekzistas en harmonia interplekto kaj modernaj kutimoj prenitaj el Okcidento kaj tradiciaj kutimoj pure japanaj.

Docento S. PRAGANO, Amsterdamo, donis panoramon de la ĉefverkoj de la monda literaturo tradukitaj en la internacia lingvo: ĝi konsistigas per si mem gravan konkretan kontribuon al la Granda Projekto Oriento-Okcidento.

Fine, S-ro Jean THIERRY, Parizo, prezentis prelegojn ilustritajn per lumbildoj pri la historio kaj la sidejo de Unesko. Li ankaŭ prilumis tutan flankon de la laboroj de tiu institucio per priskribo de la kampanjo pri savado de la Nubiaj monumentoj.

Al la kvalito de la prelegantoj respondis la kvalito de la aŭskultantoj: ĉeestis sufiĉe multaj gvidantoj de landaj asocioj, multaj komitatanoj de U.E.A., inter kiuj 5 el la 8 estraranoj; krome 5 akademianoj, pluraj verkistoj kaj aliaj eminentuloj el diversaj kulturaj kampoj. Kaj tion ni ŝuldas ne nur al la proksimeco de la Universala Kongreso en Kopenhago, kio ebligis al multaj restiplian semajnon en esperanta medio sed precipe al la kreskanta renomo de S.S.S. kaj al ĝia senlaca organizanto, Jan STRÖNNE, la ĉiam afabla, kiu sciis ne nur bombardi per informoj pri la semajno dum longaj monatoj sed ankaŭ precize kanoni strategiajn lokojn de la esperanta publiko.

Al la riĉa oficiala programo aldoniĝis kromaj eroj: ĉefe diskutado pri la baza laborprogramo de U.E.A. vidpunkte de la lokaj Societoj. Krome nin regalis per literatura vespero kun deklamado

el siaj verkoj Julio BAGHY, la bardo de la esperanta popolo. Kronis kaj finis la semajnon improviza distra vespero sub la reĝisorado de Jean THIERRY, "kabaradestro" kaj disĉiplo de Raymond SCHWARTZ. Unu kulmino de tiu vespero certe estis la imitado de la prelegintoj, kiun prezentis kun nepra talento kaj humuro Jean-Luc TORTEL: li ricevis merititan kaj tondran aplaŭdon kaj eĉ gratulojn flanke de la prelegintoj.

Entute altnivela kultura kaj distra semajno, kiun ebligis per subvencioj la oficialaj invitantoj: Sveda Unesko-Konsilantaro kaj Sveda Instituto por Kultura Interŝanĝo kun Eksterlando.

A. Albault

LA ARANĜOJ EN HELSINGØR

Ceestis 15 personoj el 17 landoj. La ordinaraĵoj kursoj funkciis tre sukcese. Speciale menciinda estas la kurso de s-ro Sögaard-Hansen, kiu per ESPERANTO LAŬ NATURMETODO (ĵus aperinta ĉe Dansk Esp-Forlag, Aabyhyhøj) instruis komencantojn el diversaj landoj, do sen apliko de nacia lingvo. Grandan laŭdon oni donis al li kaj al la metodo.

S-ro Morariu preparis novajn Cseh-metodajn geinstruistojn, s-ro Moravec (Flensburg) gvidis la perfektigajn kursojn, kaj f-ino Ida Christensen la konversacian.

Per unu el la ekskursoj ni kontaktis la KELI-aranĝon en Strandbaden, iom norde de Helsingborg, kie ni ĝuis kelkhoran restadon en plej amika atmosfero kaj aŭskultis prelegon de s-ino Alamo.


Ingrid Signore,
Trieste.

Ŝaka Rubriko

(Gvidas: D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio)

Problemo n-ro 22 (konkurso 1962 - n-ro 6)

Oscar Blumenthal



Mato en 2 movoj (pro ĝusta solvo 2 poentoj)

Kontrolo: Bl.: R f1, Da8, Kf7, Ĉg2

Ni.: Rg4

Solvojn sendu al gvidanto de la rubriko, D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio ĝis 30-11-1962.

Luiz de Camões

2

La farojn kaj la virojn multmeritajn,
el okcidenta plaĝo luzitana,
la marojn ne ankoraŭ navigitajn
pasinte, transe eĉ de Taprobana;
en lukto kaj danĝer' venkintojn spitajn,
kun forto superhoma kaj titana;
kiuj konstruis en la malproksimo
reĝlandon, kondukitan al sublimo,

kaj ankaŭ la memorigaĵojn glorajn
pri tiuj reĝoj, kiuj prosperigis
la fidon, l'imperion; kaj senmorajn
afrikajn kaj aziajn landojn ligis;
kaj tiujn, kiuj verkojn multvalorajn
farinte, el mortleĝ' sin liberigis;
konigos kante mi en ĉiu parto,
se tiom helpas min talent' kaj arto.

De la saĝulo greka, de l'trojano
la grandaj navigadoj ĉesu nun;
de Aleksandro, same de Traĵano,
mutiĝu famo pri batalfortun';
ĉar kantos mi pri inda luzitano,
al kiu Mars' obeis kaj Neptun';
de l'muz' antikva ĉiu kant' cetera
nun ĉesu antaŭ ĉi valor' supera.

Kaj vi, taĵidoj miaj, ĉar talenton
en mi vi kreis kun novarda brilo,
se ĉiam gaje vian elementon
mi verse gloris, plena de humilo,
al mi nun donu grandan elokventon,
subliman sonon en fluega stilo;
ke Febo viajn akvojn instrukciu:
al Hipokrene ĝiajn ne envidu.

Min armu per impeto altsonora,
kaj ne de fluto kruda, malfortkanta,
sed de trumpeto, en batal' fervora,
hejtanta bruston, vangon ruĝiganta;
kantigu inde min al faro glora
de via gent' al Mars' sin alliganta:
ke ĉiuj kantu en la universo,
se tiom da merito indas verso.

Kaj vi, nobela garanti' sekura
de l'praa libereco portugala,
kaj la espero kaj certec' aŭgura
pri kresko de la kristanar' lojala;
vi, de la maŭroj malamik' terura,
de l' nuna tempo mirindul' fatala;
al mond' vin donis Di' por ĉie troni,
kaj grandan mondoparton al li doni.

Vi, dolĉa spros' floranta diligente
sur arbo de Jesuo, pli amata
ol iu ajn naskita okcidente,
Cezara aŭ Kristega alnomata;
(ĝin vidu sur la ŝildo, nunmomente
montranta venkon de l' pase' freŝdata
en kiu li l'armilojn al vi donis,
per kiuj li surkruce sin glorkronis);

vi, reĝ' potenca, kies imperion
la leviĝanta sun' unue vidas;
ĝuanta ankaŭ de l'zenit' radion;
sur kiun laste la subir' incidas;
ke jugon donu vi kaj pilorion
al fia maŭra rajdantar', ni fidas,
al orienta turk', al gent' trinkanta
ankoraŭ akvon de l'rivero sankta.

La majestecon klinu de l' vizaĝo,
la mildajn junajn trajtojn mi kontemplu;
ŝajnantajn kvazaŭ jam en tuta aĝo,
kiam vi iros al eterna templo;
l' okulojn turnu kun bonvola saĝo,
impresos vin profunde ĉi ekzemplo
de am' al gloraj faroj de l'patruj',
per ritmaj versoj dissemota tuj

Ne pri ficel', sed pri eterna amo
al la patrujo estos ĝi atesto;
ne estas ja ficelo, la aklamo
naskota pro laŭdad' al hejma nesto.
Nomojn levitaj vidos vi al famo,
vi juĝos, kio levas pli la sentojn:
por kiuj estas vi supera estro,
la mondon regi aŭ tielajn gentojn.

Vi aŭdos, ne pro heroaĵoj dandaj,
trompigaj, fantaziaj kaj mensogaj,
la viajn laŭdi, kiel en fremdlandaj
muzverkoj bravegaĵojn sinarogaj.
La niaj, veraĵ, estas tiel grandaj,
superaj al revataj, analogaj,
pri Rodamonte, pri legend' Ruĵera,
kaj pri Roland', eĉ se li estus vera.

Vi havos, anstataŭe, Nunon feran,
servintan reĝon, regnon, laŭ postulo;
Dom Fuas, Egas (kitharon homeran
aspiras mi por ili, sen makulo).
Kaj anstataŭos la Dekduon Peran
l'Angla Dekdu' kaj ĝia Malgrasulo.
Vi havos ankaŭ tiun noblan Gaman,
prenintan de Eneas gloron faman.

Kaj se anstataŭ reĝo Karl' la franco
aŭ de Cezar' vi volas saman faron,
Afonso jen, l'unua, kies lanco
ombrigas ĉiun fremdan glorfanfaron;
kaj tiu, kiu per batalbonŝanco
al sia regno donis la memstaron;
Johan' la dua, pri malvenk' nescia,
Afonso kvara, kvina kaj la tria.

Mi ne forgesos verse kanti plurajn,
kiuj en la Reĝlandoj de l'Aŭroro
akiris venkojn daŭrajn kaj sekurajn
kaj vian flagon gvidis al la gloro;
Pachecon ŝtalan, ankaŭ la terurajn
Almeidas, kies estas Taĵo-ploro;
timigan Albuquerque, Castro fortan,
alian aron, same ja senmortan.

Dum tiujn kantas mi, (Sublima Reĝo,
por kanti vin mi estas senmerita)
sidiĝu vi sur via Alta Seĝo:
vi estos tem' por kanto neaŭdita.
Eksentu grandan pezon de l' sieĝo,
(ke l' tutan mondon prenu mir' subita)
de faroj kaj armeoj eminentaj,
afrikaj landoj, maroj orientaj.

Sur vin l'okulojn fiksas frida maŭro,
sciante, ke vi premos lin en koton;
la kolon donas la barbara Taŭro
al jugo, nur vidinte vian floton;
preparis Tetis, por eterna daŭro,
lazuran sian regnon kiel doton;
ŝi viajn junajn belajn trajtojn ŝatas,
kaj tial por bofilo vin nun svatas.

3

4

5

1

6

7

8

9

6

10

11

11

13

10

14

15

16

17

18

19

20

21

4

22

23

24

25

26

27

28

29

30

31

11

32

33

En vi sin vidas el Olimpa domo 34
de ambaŭ avoj la animoj famaj : 35
l'unua kiel anĝelpaca homo,
l'altra pro bataloj sange dramaj.
Per vi esperas ili pri renomo
de siaj rememor' kaj far' iamaj;
kaj vian lokon en l' eterna templo
rezervas por la fin' de via tempo.

N O T O J

- 1 La Luziado — Laŭ antikva legendo, Luzo, filo de Bakuso, fondis regnon situantan en la okcidenta parto de la ibera duoninsulo. Tial: Luzitanoj, popolo, el kiu parte devenas la portugaloj; la originala titolo de la verko, "Os Lusíadas", signifas "popolo de Luzo". Pro analogio kun "La Iliado" venas la esperanta titolo, La Luziado.
- 2 Luiz de Camões (1524-1580) — Plej elstara portugal-lingva poeto, verkis dramojn, lirikaĵojn kaj "La Luziadon", unu el la kvar aŭ kvin grandaj epopeoj de la mondo.
- 3 Taprobana — antikva nomo de Cejlono
- 4 la Trojano — Eneas, princo de Trojo, heroo de "La Eneido" de Vergilio, latinlingva epopeo saĝulo greka — Uliso, heroo de "La Iliado" kaj "La Odiseo", la du grandaj grekaj epopeoj de Homaro
- 5 Aleksandro — Reĝo de Makedonio, venkis batale la tutan Grekujon, Egiptujon, grandan parton de Azio Trajano — Romia imperiestro (98-117), venkis la Partojn, ĝermanojn kaj dacojn
- 6 Marso — roma dio de la milito
Neptuno — roma dio de la maro
- 7 taĵidoj — nimfoj de la rivero Taĵo
- 8 Febo — aŭ Apolo — greka dio de la suno, de la muziko kaj poezio
- 9 Hipokrene — greka akvofonto, dediĉita al Apolo kaj la muzoj
- 10 Dediĉo al portugala reĝo D. Sebastiano
- 11 maŭroj — mahometanoj invadintaj Nordafrikon kaj Hispanujon
- 12 Cezara — imperiestra, aludo al la germanaj imperiestroj (Kaiser)
Kristega — titolo uzata de la franca reĝa familio
- 13 Aludo al la kvin kvinanguloj de la tiama portugala flago, reprezentantaj la kvin vundojn de Jesuo sur la kruco
- 14 rivero sankta — la rivero Ganga en Hindujo
- 15 Rodamonte — fama saracena kavaliro, figuro de la poemo "Orlando innamorato" de Boiardo
- 16 Rolando — laŭlegende unu el la dekdu Peroj de Karlomagno, ekstreme forta kaj kuraĝa
- 17 Nuno — Nun'Alvares Pereira portugala militestro, kiu multe helpis en la bataloj por la sendependiĝo
- 18 Dom Fuas — Fuas Roupinho — portugala kavaliro kaj admiralo, heroo de bataloj kontraŭ la maŭroj
Egas — Egas Moniz — portugala kavaliro, simbolo de honoro
kithara — greka nomo de la citro
- 19 la Dekdu Peroj — famaj legendaj militestroj de Karlomagno
- 20 la Angla Dekduo — laŭtradicie dekdu portugalaj nobeloj voĵagis al Anglujo dum la reĝado de Johano la unua por venĝi ofendon al damoj de tiu lando
Malgrasulo — Álvaro Gonçalves Coutinho, unu el la Angla Dekduo
- 21 Gama — Vasco da Gama, malkovrinto de la marvojo al Hindujo; ĉefrolulo de "La Luziado"
- 22 Karl' la franco — Karlomagno, reĝo de la Frankoj kaj imperiestro de la Okcidento, de 768 ĝis 814. Granda figuro de la mezepoko, ne nur en milito sed ankaŭ en politiko.
- 23 Cezaro — Julio Cezaro — Fama roma militisto, venkinto de la Galoj kaj de multaj bataloj. Imperiestro kaj verkisto.

Sed dum ne venas tiu temp' en kiu
vi regos gentojn, kiuj ĝin aspiras,
ĉi novan aŭdacaĵon aŭspiciu,
proprigu kion miaj versoj diras :
ke viaj argonaŭtoj sin eksciu, 36
dum ili tra l' arĝento sala stiras, 37
de vi vidataj sur la mar' kolera;
denun kutimu pri alvok' espera.

- 24 Afonso de unua — D. Afonso Henriques, fondinto de la portugala nacio
- 25 Johano la unua, Mastro de Aviz — Venkis en la batalo de Aljubarrota, kontraŭ Kastilio, kaj fondis novan dinastion.
- 26 Johano la dua, la Perfekta Princo — fortikigis la reĝan povon kaj stimulis la navigadon.
- 27 Afonso la tria — portugala reĝo, kiu akiris la provincon Algarve; la kvara — partoprenis la batalon de Salado;
la kvina — prenis diversajn urbojn en Nordafriko.
- 28 Reĝlandoj de Aŭroro — Aŭroro prezidis la tagalvenon; reĝlandoj de Aŭroro — la orientaj landoj.
- 29 Pacheco (elp. Paŝeko) — Duarte Pacheco Pereira, granda militisto
- 30 Almeidas (elp. Almejdas) — pluralo — D. Francisco de Almeida kaj lia filo D. Lourenço de Almeida, ambaŭ grandaj militistoj
- 31 Albuquerque, unu el la plej brilaj portugaloj de la 16a jarcento, provis fondi grandan portugalan imperion en Azio.
Castro (elp. Kastro) — D. João de Castro, vic-reĝo de Hindujo, elstara militisto.
- 32 Taŭro — virbovo, ĉi-tie la maŭro.
- 33 Tetis — edzino de Okeano, la greka mardio; al kiu ŝi naskis la Okeanidojn, marajn nimfojn.
- 34 Olimpo — loĝejo de la dioj en la greka mitologio
- 35 ambaŭ avoj — La patra avo de D. Sebastiano estas Johano la tria, tre pacama reĝo. Lia patrino avo estis Karlo la kvina, germana imperiestro, kiu revis unuigi la tutan mondon sub sia sceptro.
- 36 argonaŭtoj — legendaj maristoj de la ŝipo Argo
- 37 arĝento sala — la maro

Noto de la Redakcio :

ĈU VALORAS ?

Sendinte al ni la supran tradukon, s-ro Knoedt (la tradukinto de la volumo "Elektitaj poemoj de Castro Alves", vd. "Esperanto", aprilo 1961, p. 73), skribis ankaŭ jenon :

"La verko apartenas al la mondliteraturo... Mi dezirus aŭskulti vian opinion kaj se eble tiun de kelkaj legantoj antaŭ ol entrepreni tiun kelkjaran laboron, kia estas la tradukado de pli ol 8000 versoj. Mia dubo pravigita pro la akcepto de "Elektitaj Poemoj" de Castro Alves.... Malgraŭ la esceptaj kondiĉoj de havigeblo per interŝanĝo, nur tre malmultaj ekzempleroj estis menditaj. Ĉu do la tradukado de tiu longa verko valoras la penon?"


Tiu letero vekas tri komentojn :

(a) La "Elektitaj Poemoj" estas verko elstarega en la esperanta literaturo. Ĝi estas facile havebla de preskaŭ ĉiuj. Kial do nur malmultaj havigis ĝin al si?

(b) La "Elektitaj Poemoj" estas eldonita de universitato. Kian impreson donas pri la Esperanto-movado al la universitataj instancoj la malvasta mendado de la de ili eldonita valora verko?

(c) Ĉu la esperantistoj ne deziras kuraĝigi tiujn talentulojn, kiuj dediĉas sin al gravaj literaturaj taskoj, laŭ la ekzemplo kaj admono de Zamenhof? Ĉu valoras la penon, labori dum jaroj super malfacila tasko, ĝin triumfe venki, kaj — resti nelegata?

Ĉu valoras la penon de s-ro Knoedt, entrepreni la tradukon de la portugala ĉefverko? Kiu interesiĝas, tiu povas skribi sian opinion al: S-ro Leopoldo H. Knoedt, Rue Aurélio Espinheira 2, Baix do Bonfim — Salvador, Brazilo.



LA JUNA VIVO

Cion por la redakcio de "L. J. V." sendu al:
Ivo Osibov, Sinjskih Žrtava 13/II SPLIT,
Jugoslavio.

Per tiuj ĉi vortoj ni deziras danki al s-ro Heinrich Reiter, la ĝisnuna redaktoro de "L.J.V.", por lia valorega helpo en la kritikaj momentoj de la gazeto kaj ĝia longjara redaktado. Ni deziras al li sukcesojn en lia "pliaĝula" laboro.

La Komitato de TEJO

La 18-a IJK de TEJO en Ystad (Svedujo) — 11-a ĝis 18-a de aŭg. 1962

La 18-an de aŭgusto finiĝis en bela ripozloko ĉe sudsveda urbo Ystad la 18-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO. Legataj artikoloj konsiderinde postiras la tempon, sed en ĉiu okazo la pasinta kongreso restas aktuala, ĝis la venonta en Vraca, kaj per tio ni provu kontentiĝi.

Al SEJU. — La 18-an IJK-on organizis la Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo. Ĝi transprenis la taskon komence de tiu ĉi jaro, kiam evidentiĝis, ke en la Danlando ne estas eble aranĝi ĝin. La Kongresa Komitato estis dissemiita tra la tuta lando kaj ĝia prezidanto dum la tuta tempo vivis en Stockholmo. Malgraŭ ĉio restas la sola vere riproĉinda fakto nur la alta kotizo, kiun tamen kaŭzis nesufiĉa prepartempo kaj ne la organizantoj. Ankaŭ dum la kongreso mem la Kongresa Komitato konstante kunsidis por ke ĉio marŝu glate. Por la "publiko" ne ekzistis malagrablaĵoj sed nur "oficialaj informoj" de la ĉie trovebla prezidanto de LKK, Nils-Erik Kristofersson, samtempe prezidanto de SEJU. La Komitato de TEJO esprimis al la gastiginta landa sekcio sinceran dankon kaj gratulon.

Por klara perspektivo. — Semajnon post la unuana akcepto de la Dua Baza Laborplano de UEA en Kopenhago, venis same unuana akcepto de la Unua Perspektiva Laborprogramo de TEJO, fare de TEJO, fare de TEJO-Komitato, kiu aprobis ĝin dum sia lasta kunsido en Ystad.

La plena teksto de la Laborprogramo estos kune kun ĉiuj kongresaj materialoj sendita al ĉiuj landaj sekcioj kaj al ĉiuj organoj de UEA. Baldaŭ ĝi ankaŭ estos havebla por la grupoj kaj unuopaj esperantistoj. Kvin ĉapitroj de la Laborprogramo kun 19 punktoj kaj 78 subpunktoj vere estas bona orientilo kaj helpilo por TEJO, landaj sekcioj, junularaj grupoj kaj ĉiuj junaj esperantistoj, kiuj povos apogite al ĝi multe pli unuece kaj efike plenumadi tion, kio estas nun kaj en proksima estonteco plenumenda de la tutmonda esperantista junularo en la kadroj de ĝeneralaj taskoj de la Esperanto-movado.

La programo ekzemple en la punkto II/m substrekas la neceson, ke la landaj sekcioj zorgu pri konstante neŝanĝita meza aĝo de sia membraro. La punkto estas necesa por ke ne plu okazu, ke ekzemple en Nederlando "...nun ekzistas formale nur la

LA JUNA VERDA FLAGO SUR LA SABLA STRANDO

La 18-a IJK de TEJO en Ystad (Svedujo) — 11-a ĝis 18-a de aŭg. 1962

Estraro, ĉar en la jaroj 1959 — 62 la membroj aŭ malaperis aŭ geedziĝis... kiel skribas en la raporto la Ĝenerala Sekretario de TEJO. Interalie troviĝas en la programo apartaj punktoj pri la kampanjo "neesperantistaj junularaj organizaĵoj", informado, kultura agado, kunlaboro kun UEA kaj landaj asocioj, junularaj grupoj ktp.

Nova estraro — ĉiujare havas IJK la gravan taskon, elekti novan estraron de la organizo por la sekvanta jaro. Post kiam la Komitato aprobis ĉiujn raportojn krom la kasistan, kiu ne estis ankoraŭ reviziita; ĝi esprimis dankon al la malnova estraro kaj elektis novan en jena konsisto:

Prezidanto — Günther Becker (Germanujo), zorgas samtempe por kongresoj kaj kontaktoj kun neesperantistaj organizaĵoj; **vicprezidanto** — Simeon Simeonov (Bulgario), informado; **vicprezidanto** — Carlo Minnaja (Italujo), fakaj sekcioj kaj servoj; **ĝenerala sekretario** — Marek W. Pietrzak (Pollando), zorgas ankaŭ por Junularaj delegitoj; **redaktoro de LJV** — Ivo Osibov (Jugoslavio); **kasisto** — Humphrey Tonkin (Britujo); **estrarano** — Svobodan Zlatnar (Jugoslavio), kulturaj aferoj kaj lerneja kampanjo.

Krom tio estis elektitaj kelkaj komisiitoj por koresponda servo, turismo, Afriko, Azio, kaj aliaj. Ni menciis, ke Ivo Osibov antaŭ ol foriri soldatservi jam estis redaktoro de LJV kaj nun ree ricevis tiun ĉi postenon, kaj ke Humphrey Tonkin venontjare studos en Usono, sed li tamen konsentis plue esti la kasisto de TEJO. La lastan tagon de la kongreso kvin ĉeestantaj membroj de la nova estraro kunsidis kaj fiksas la labormetodon de la estraro, kiu havu estonte ankoraŭ pli da internaj kontaktoj, ol ĝis nun.

La aranĝo mem — Ni ne ankoraŭ parolis pri la kongreso mem, nur pri iuj ĝiaj rezultoj. La kongreso spite al ĉiuj tradicioj komenciĝis en Malmö, kie la kongresanoj pasigis tre agrablan vesperon en la tiea Esperanto-klubo, tranoktis en la junulargastejo kaj dimanĉe, post vizito en universitata urbo Lund, fine alvenis al la vera kongresurbo Ystad ĉe Baltika maro, kie tuj post la vespermanĝo kaj oficiala inaŭguro okazis la Kongresa balo. Antaŭe videbla laceco en momento malaperis kaj ĝenerale la balo

finiĝis je la unua nokte. Lunde matene jam okazis la grupaj diskutoj kaj je la 10-a ekkunsidis la Komitato. Tuj post la lunĉo, vizito al la urbo kun belaj trabfakaj domoj kaj esperanta flago sur la plej alta masto, kaj vespere tagmanĝo (rim.: svedoj tagmanĝas je la 19-a horo) kun la urbaj aŭtoritatoj. Vere bele estis, kiam la urbestro de Ystad, kiun akompanis 4 urbaj konsilantoj, alparolis la kongresanojn, ĉar li mem estas esperantisto. Sekvis viglaj diskutoj inter kongresanoj kaj urbaj reprezentantoj, samtempe dancemuloj povis ritmi laŭ la taktoj de hotela orkestro. De la urba junularo venis nur unu reprezentanto, tamen viglega diskuto kun li pri la internacia lingvo daŭris ĝis la 1-a nokte, kiam oni interkonsentis pri nova renkontiĝo. Kompreneble la venontan matenon la kunsido de la Komitato kaj studvizito por aliaj al enurba presejo startis precize je 9,15.

Tiel aspektis la tuta kongressemajno. Per iom da statistiko: la tuta kongrestempo — 168 horoj, de tio laboro (kunsidoj, diskutoj, prelegoj) — 36 horoj, dormado — 51 horoj, aliaĵoj (ekskursoj, vizitoj, dancoj...) — 81 horoj. La Komitato havis ses kunsidojn, estraro unu, subskribintoj de la Deklaro de Wokingham du, landaj estraroj unu, kaj okazis unu Ĝenerala Kunveno de TEJO. Dum la kongreso estis elektitaj: 7 estraranoj, 4 komisiitoj kaj 1 Miss-Esperanto, Marianne Bergman el Svedujo. En la Oratora konkurso, kiun partoprenis 5 gejunuloj el Germanujo, Jugoslavio, Norvegio kaj Pollando, la unuan premion de 50 sv. kronoj gajnis Svobodan Zlatnar el Jugoslavio parolinta pri "Esperantismo antaŭ 50 jaroj kaj esperantismo nun", la duan premion de 25 sv. kronoj gajnis f-ino Hannelore Lukesch el Germanujo pritraktinta la temon "Utilo de sputnikoj".

Speciale estas menciendaj du altnivelaj prelegoj por la kongresanoj. El Frostavallen, kie samtempe okazis la Sveda Somera Semajno, venis prelegi al la gejunuloj prof. dr. H. Yagi pri junularo kaj UNESCO-movado kaj prof. dr. Ivo Lapenna pri "Kiel oni igu esperanton alloga". Ambaŭ prelegojn sekvis vigla diskutado.

Aparte ni menciis ankaŭ la tutagan ekskurson tra Skanio. Tiun tagon eĉ

la vetero, kiu ĝenerale estis iom aŭtuneca, precipe por "pli ekzotikaj eksterlandanoj" kiel sin esprimis Nils- Erik Kristofersson, ekfavoris la 18-an IJK, ĉion ceteran prizorgis LKK. De la marbordo kondukis la vojo iom enlanden, la aŭtabuso ofte haltis, jen por vidi la malnovajn tombojn, jen por viziti lokon, la vitraĵfabrikon, por lunĉi ktp. Ĝuste antaŭ la reveno al Ystad la ŝoforo meminitate prizorgis la viziton de — glaciaĵfarejo. Rekordo por unu persono estis tiam 10 forlekitaj glaciaĵoj. Tre sukcesa ekskurso.

Kiel kutime ne eblas priskribi ĉion. Post abunda programo, post longegaj kunsidoj, ĉiam ankoraŭ restis tempo por danci, kaj la du Skotoj — John kaj Ian ĉiam havis ĉemane sian gitaron kaj neniam rifuzis kanti...

La Komitato de TEJO kunsidis ĉiutage preskaŭ konstante. Al Ystad venis 13 de kune 22 komitatanoj kio ebligis al la Komitato kompetente pritrakti la tagordon. Estas aparte substrekinde, ke la Ĝenerala Sekretario Marek Pietrzak jam antaŭe preparis ampleksan skriban raporton pri la agado de TEJO en la laborjaro 1961/62, projekton de la Perspektiva Laborprogramo kaj proponon por la tagordo de komitataj kunsidoj. Humphrey Tonkin sendis bonan kasistan raporton kaj la buĝetproponon por la venonta jaro. Bone preparitaj bazaj materialoj ebligis al la Komitato tuj alpaŝi la problemojn.

Pri diversaj decidoj de la Komitato en Ystad oni ankoraŭ skribos en LJV kaj iliaj ĝustaj formuligoj estas troveblaj en la kongresa raporto de la Ĝenerala Sekretario. Senhezite oni povas diri, ke la kunsidojn karakterizis labora atmosfero, la diskutojn komprenemo por alies opinioj kaj la decidojn preskaŭ ĉiama unuanimeco.

La Komitato de TEJO konstatis la bezonon de internacia junulara revuo en esperanto kaj ĝi decidis starigi fonduson "Internacia junulara revuo" por kiu venos la unua kontribuo de la venditaj libroj, kiujn lasis en Svedujo la bulgaraj reprezentantoj. Landaj sekcioj kaj aliaj, kontribuu al la fonduso por nia propra revuo!

TEJO en la kuranta laborjaro interalie direktos sian helpon por starigo kaj fortigo de landaj sekcioj en Hungarujo, Aŭstrujo kaj Belgio kiu estas plej maturaj por tio, kaj konsiderante la UK en 1965 ankoraŭ klopodos por fondo de la junulara sekcio en Japanujo. La Komitato ankoraŭ decidis peti UEA por plua aktiva helpo al TEJO precipe por fondo de junularaj sekcioj en ĉiuj landoj, kie jam ekzistas la landaj asocioj de UEA.

La limigita spaco ne permesas paroli pri aliaj decidoj kaj diskutoj de la Komitato.

La Deklaro de Wokingham — La reprezentantoj de la bulgara, franca, germana, jugoslavia, pola kaj sveda

junularaj sekcioj kunsidis dufoje. Mankis nur unu subskribinto de la deklaro pri kunlaboro inter la landaj sekcioj — Hispanio. Dum tiuj kunsidoj oni kompletigis la Deklaron per la kontrakto pri reciproka partopreno en gravaj landaj aranĝoj, intersanĝo de organiza materialoj (jarraportoj, statutoj, gazetoj ktp.), ĉefamilia restado de gejunuloj kaj regulaj kontaktoj kun la Ĝenerala Sekretario de TEJO.

La kunsidojn de la deklarintoj ĉeestis ankaŭ gejunuloj el Belgio, Nederlando, Norvegujo kaj Italujo. Fine de la kongresa semajno la Itala Esperanto-Junularo ankoraŭ aliĝis al la Deklaro, kiun nun konfirmas la subskriboj de ok landaj sekcioj de TEJO.

☆

8. INTERNACIAJ SKIFEROJ kun INTERNACIAJ SKIKONKURSOJ de "Tutmonda Esperantista Junulara Organizo" de la 25.XII. ĝis 8.I. 1962/63 en KITZBÜHEL, Tirol, Aŭstrio

Post diversaj malfacilaĵoj kaj ŝanĝoj rilate la lokon de la ĉivintra skiferioj de TEJO ni fine sukcesis, rezervigi por ni la bele ekipitan, komfortan restaŭracio-pension

"EINSIEDELEI"

situanta duonhoron surmonte super la mondfama internacia kaj mondona skivilago KITZBÜHEL. La aranĝoj komenciĝas per la vespermanĝo kaj finiĝas per la tagmanĝo.

Tempo ĝenerala por stud. antaŭ de la prezo: kaj gejunuloj pago: aranĝo: ĝis 21-j.

25.12-8.1	1300.—	Aŭstr. ŝil.	1150.—	700.—
25.12-1.1	700.—		650.—	400.—
1.1-8.1	700.—		600.—	400.—

Aliĝo: La aliĝo devas nin atingi ĝis plej malfrue la 1-a de Novembro. Aliĝo sen samtempa antaŭpago ne validas. Eventuale liberajn lokojn ni transdonos la 1-an de Nov. al alia organizo. Se vi volas neniigi vian aliĝon antaŭ la 1-a de Nov., vi rericevos la antaŭpagon malpli 90.— ŝil. Storno post tiu-ĉi dato nur eblas, se anstataŭanto povas esti trovita ĝustatempe.

Aliĝoj por nur kelkaj tagoj aŭ por nekompletaj aranĝtempoj ne eblas pro teknikaj kaŭzoj. Demandoj en tiu-ĉi rilato restos senfruktaj. Sed eblas ricevi la aranĝon sen aŭ kun vespermanĝo, se tio estas speciale dezirata de iu.

Nia pensiono Einsiedelei situas meze en arbaroj kaj skikampoj. Oni ĝuas belegan rigardon al la vilaĝo Kitzbühel, al la Kaisermontaro kaj al "Kitzbüheler Horn". La pensiono estas atingebla aŭ piede aŭ per aŭtomobilo (Jeep, 7.— S).

Ĉiu ĉambro havas varman kaj malvarman akvon, centran hejtadon kaj balkonon. Krome ni disponas pri sunplena teraso, pri bonega kuirejo kaj pri ege abundaj eblecoj por promenoj kaj ekskursoj (kun aŭ sen skioj). La liftojn, amuzejojn kaj antaŭ ĉio la mondfamajn skiejojn kaj skikampio-

nojn, la tie loĝantajn eminentulojn kaj "Appres-Ski"-emulojn mi ne bezonas mencii.

Programeroj (provizoraj):

Internaciaj skikonkursoj inter la ĝe-partoprenantoj.

Liftveturoj, interalie al "Hahnenkamm", unu el la plej mondfamaj skiejoj. — Unufoja manĝado en la pensiono "Toni Sailer".

Filmprezento pri Kitzbühel. Rigardo al la granda internacia torĉo-skiado sur la elektre heligota skipisto dum la silvestra nokto kaj multegaj kutimaj kaj nekutimaj fulmeroj.

ATENTU, ATENTU Ni nur havas lokojn por 30 personoj. Ĉar supozeble regas granda intereso pri partopreno ni rekomendas al Vi, certigi al Vi la lokon per **tuja aliĝo** kaj antaŭpago al la subskribinto, kiu kore salutas Vin kaj kiu kiel gvidanto de la aranĝoj ĝojus renkontiĝi kun Vi kaj Viaj geamikoj en Kitzbühel. Venu nepre al la **PLEJ BELA KAJ PLEJ INTERNACIA ESPERANTISTA VINTRA ARANĜO EN LA PLEJ MONDFAMAN VINTROSPORTVILAĜON**. Je rendezvuo en Kitzbühel!

Demandu je prospekto en Via Vojaĝoficejo. Represo petatu.

WIEN X., Van der Nüllg. 100/10/15
Heinrich Reiter, Aŭstrio

☆

MALLONGE

Ĉu naciismon venkos internaciismo? — Tio estas la titolo de la 6-a Internacia Seminario de Germana Esperanto — Junularo de la 27-a de dec. 62, ĝis la 2-a de jan. 63 en moderna junulargastejo de Rüsselheim/Main, situanta proksime al Frankfurt/Main. GEJ invitis plurajn fakulojn prelegi pri la seminaria temo. La kotizoj: por la gejunuloj ĝis 25 jaroj — 50 GM, pliaĝuloj 60 GM. La gejunuloj ĝis 25 jaroj ricevos repagon de vojaĝkostoj en Germanujo, verŝajne en la alteco de 50%.

Aliĝu al: Deutsche Esperanto — Jugend, 29 OLDENBURG; poŝtĉekoficejo Karlsruhe n-ro 54577. GEJ petas antaŭpago 10 GM al la citita poŝtĉekkonto.

Dokumentoj pri TJO kaj TEJO — En la arĥivoj de TEJO mankas multaj dokumentoj kaj materialoj pri la ĝisnuna historio de la organizo kaj ĝin antaŭinta TJO. La nunaj kaj iamaj perantoj, estraranoj, membroj, partoprenintoj de kongresoj ktp. estas petataj sendi almenaŭ parton de la materialo kiun ili posedas al la Ĝenerala Sekretario de TEJO: Marek W. Pietrzak, Kraszwskiego 56/7 TORUN, Pollando. — Por ke ni sciu iom pli multe pri ni mem.

Atenton! Nova redaktoro de LJV — Lia adreso estas:

Ivo Osibov, Sinjskih Žrtava 13/II, SPLIT, Jugoslavio.

La numeron redaktis —

Svobodan Zlatnar

RICEVITAJ LIBROJ

Lina Gabrielli : LA KOMBILO. Eld. Karol Kleszczynski Eldonisto, Romo, 1962. Kun ilustraĵoj de Mary Pietropaolo. 72p. 20,5 x 14 cm. Prezo nemontrita.

Maŭ Zedong : KOMENTARIOJ PRI LA BLANKA LIBRO. Trad. el la ĉina. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinujo, 1962. 56 p. 19 x 13 cm. Prezo : bind. 0,75 gld. (3 steloj); broŝ. 0,50 gld. (2 steloj).

Tutĉinia Federacio de Sindikatoj : LA KULTURA VIVO DE LA ĈINAJ LABORISTOJ KAJ OFICISTOJ. Trad. el la ĉina. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1962. 72p. 18,5 x 16 cm. Prezo : 1 gld (4 steloj).

Redakcio de Ĉina Fotografio : PEJZAĜOJ DE ĈINIO. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1962. 52p. 24 x 26 cm. Prezo : 2,50 gld. (10 steloj).

Hans Wingen : WÖRTER DER GEGENWART, DEUTSCH-ESPERANTO (AKTUALA TERMINARO). Eld. Esperanto-Verlag Limburger Vereindruckerei GmbH, 1962. 56p. 16 x 11,5 cm. Prezo: 3,90 gmk (13 steloj).

Willem Groen : KIAL KONTRAŬ VIVISEKCIO ? El la nederlanda trad. A. Breddels. Eld. Mondkoalicio kontraŭ vivisekcio, Hago, 1962. 8p. 23,5 x 15,5 cm. Prezo : 2 steloj.

Maŭ Zedong : PAROLADOJ ĈE LA LITERATURA KAJ ARTA KUNSIDO EN JAN-AN. Trad. el la ĉina. Eld. Esperanto-Ligo, Pekino, 1962. 48p. 18,4 x 13 cm. Prezo : 0,35 ned. gld. (1,4 steloj).

PITORESKAĴOJ DE PEKINO. Libreto de 12 koloraj fotoj. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1962. 10,5 x 17 cm. Prezo : 0,50 ned. gld. (2 steloj).

David H. Withey (red.) : UNIVERSALAJ SKOLTAJ SIMBOLOJ. Eld. Skolta Esperantista Ligo (21 Brookfield Ave., Waterloo, LIVERPOOL 22, Britujo), 1962. 16p 10 x 16,5 cm. Prezo 8 pencoj (1,3 steloj).

L. L. Zamenhof : PROVERBARO ESPERANTA. Alfabeto ordigita kaj provizita de indeksoj analiza kaj sinteza de C. Rogister (kun posthelpo de A. Caubel). Enkonduko de G. Waringhien. Antaŭparoloj de M. F. kaj L. L. Zamenhof. Stafeto : Beletraj kajeroj, 10. Eld. J. Régulo, La Laguno, 1961. 196p. 19 x 12 cm. Prezo : 1,50 us. dol.

Henri Baupierre : SPECIMENE. PARODIOJ KAJ PASTICOJ. Dekoracioj de Gérard Jaques kaj Manolo Millares. Stafeto : Beletraj kajeroj, 11. Eld. J. Régulo, La Laguno, 1962. 138p. 19 x 12 cm. Prezo : 1,50 us. dol.

William Gilbert : PLANLINGVAJ PROBLEMOJ (ESPERANTO KAJ LA NATURALISMO). Antaŭparolo de W. J. A. Manders. Stafeto : Beletraj kajeroj, 12. Eld. J. Régulo, La Laguno, 1962. 100p. 19 x 12 cm. Prezo : 1,00 us. dol.

Kahlil Gibran : LA PROFETO. En la angla trad. Roan Orloff Stone (kun postkonsilado de Reto Rossetti). Antaŭparolo de Elias F. Shamon. Enkonduko de E. James Lieberman. Stafeto : Beletraj kajeroj, 13. Eld. J. Régulo, La Laguno, 1962. 128p. 19 x 12 cm. Prezo : 1,00 us. dol.

Teruo Mikami : KIO ESTAS TANKAO ? (LA 31-SILABA UTAO). Eld. La Redakcio de Oomoto, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo, 1962. 11p. 20,5 x 14 cm. Prezo : 2 int. resp. kup.

Frank Duff : EN LA SERVO DE LA LEGIO : EDEL QUINN. Esperantigis Frato Leotado De Ruyver f.c. Eld. Fratoj de l' Karitato, Bierbeek, Belgujo, 1961. 39p. 21 x 13,5 cm. Prezo : 1,10 ned. gld. (4,4 steloj).

Alberto del Fante : DE LA DUBO AL LA KREDO. Trad. Fr. Arni Decorte f.c. kaj Fr. Leotadio de Ruyver f.c.

Eld. Fratoj de l'Karitato, Bierbeek, Belgujo, 1961 32 p. 21 x 14 cm. Prezo : 0,75 ned. gld. (35 steloj).

Frato Arni Decorte : LA PATRO DE LA LEPRULOJ. Eld. Fratoj de l'Karitato, Bierbeek, Belgujo, 1960. 46p. 21 x 14 cm. Prezo : 0,75 ned. gld. (3 steloj).

Mons. J. Lebon : LA MIRINDAĴOJ DE MARIA. Trad. Fr. Leotado de Ruyver f.c. Eld. Fratoj de l' Karitato Bierbeek, Belgujo, 1961. 30p. 21 x 13,5 cm. Prezo : 0,75 ned. gld. (3 steloj).

NOVAJ DISKOJ

Disko PEP 3259-60. Teksto de A. Ribot, legita de Darlo Rodriguez kaj Emilija Lapenna. Eld. Editions Francaises d'Esperanto, Marmande, Francujo, 1962. 45 t.p.m. E.P. Prezo : 3 ned. gld (12 steloj).

TEENAGE ESPERANTO. Disko (33 t.p.m.). Prezo : 3 steloj. Propaganda kaj instrua materialo por anglalingvanoj. Aliaj helpiloj : VOCAB WHEEL. prezo : 1 stelo : GRAMMAR WHEEL, Prezo : 1 stelo; FOLIOJ po 6 por 1 stelo. Aldonu 2 stelojn por sendkostoj. Eldonas : L. G. Hartridge, 64 Laurier Road, Addiscombe, CROYDON, Surrey, Britujo.

LITERATURA KONKURSO LUIS HERNANDEZ

Esperanto-Grupo Valencia, kun la celo omaĝi sian plej aktivan kaj sindoneman membron, dumvive Luis Hernández, organizas literaturan Konkurson kaj invitas la tutmondan esperantistaron partopreni ĝin, laŭ la jenaj reguloj :

- 1.a La konkursaĵo estu originale nepublikigita prozaĵo, laŭ libera temo (novelo, eseo, rakonto, ktp).
- 2.a Sendu ĝin prefere maŝinskribita kaj trioble.
- 3.a La longeco de la skribaĵo ne estu pli ol 4.000 vortojn.
- 4.a Skribu sur ĉiu konkursaĵo pseŭdonimon kaj, en aparta fermita koverto, kun la sama pseŭdonimo, klaran indikon pri la vera nomo de la konkursanto, adreso kaj eta biografio.
- 5.a Oni asignas unu premion kaj unu subpremion el 700 kaj 300 pesetojn, respektive, al la du plej bonkvalitaj verkoj prezentataj.
- 6.a Sendu ĉion al la jena adreso : S-ro Francisko Amorós Rico, strato Milagrosa, 12, 2.^o, Valencia (España).
- 7.a La premiitaj verkoj aperos, laŭeble, en la Bulteno de la valencia Grupo, kaj sen la permeso de la Redaktoro de tiu organo, oni ne rajtas antaŭe aperigi ilin en alia gazeto.
- 8.a Trimembra internacia komisiono juĝos la verkojn kaj ĝi rajtas reteni premiojn se, ĝiaopinie, la kvalitoj de la konkursaĵoj ne estos premiindaj.
- 9.a La konkursaĵoj estos akceptataj ĝis la fino de venonta Decembro 1962a.

Esperanto-Grupo Valencia

Listo de Premiitoj en la Belartaj Konkursoj 1950-1962

Tiu ĉi listo inkluzivas ricevintojn de unua, dua aŭ tria premio en iu ajn branĉo de la Konkursoj (inkluzive de la Kongreslandaj Branĉoj), kaj ricevintojn de la Premio "Nova Talento". Inter parentezoj estas montrita la nombro de ricevitaj premioj.

Albert, Antonija, (Jugoslavio). (2).
 Applebaum, J. D., (Anglujo). (1).
 Auld, William, (Skotlando). (10).
 Bernard, Roger, (Francujo). (1).
 Boulton, Marjorie, (Anglujo). (21).
 Carlsson, Magda, (Svedujo). (1).
 Chaves, Sylla M., (Brazilo). (1).
 Clark, Ewart, (Anglujo). (1).
 Conterno Guglielminetti, Clelia, (Italujo) (3).
 Cszászár, Sandor, (Hungarujo). (3).
 Daly, E. de B., (Anglujo). (2).
 Delor, Jean, (Francujo). (2).
 Dinwoodie, John, (Skotlando). (8).
 Dondi, Enrico, (Italujo). (4).
 Foote, A. D., (Anglujo). (1).
 Francis, John, (Skotlando). (1).
 Fraser, Tom, (Skotlando). (2).
 French, R. J. (Anglujo). (2).
 Fridén, Henry, (Norvegujo). (3).
 Grattapaglia, Giuseppe, (Italujo). (1).
 Graversen, C., (Danujo). (1).
 Guma, Salvador, (Hispanujo). (1).
 Holmes, H. W., (Anglujo). (1).
 Izák, Ludoviko, (Ĉeĥoslovakio). (1).
 Jervis, G. C. (Anglujo). (2).
 de Jong, S. S., (Nederlando). (1).
 de Kock, Edwin, (Sudaŝtato). (3).
 Kořinek, Jiří, (Ĉeĥoslovakio). (4).
 Lane, E., (Anglujo). (1).
 Lapenna, Emilija, (Jugoslavio). (2).
 Leser, Jolante, (Aŭstrio). (1).
 Mattos, Geraldo, (Brazilo). (2).
 Michling, Horst, (Germanujo). (1).
 Miyamoto, M., (Japanujo). (2).
 Musella, Vincenzo, (Italujo). (2).
 de Orriols, A., (Francujo). (2).
 de Oyarzabal, Juan, (Meksikio). (2).
 Piron, Claude, (Belgujo). (3).
 Raimar, Trygve, (Norvegujo). (1).
 Richardson, D., (Usono). (1).
 Ritterspach, C., (Germanujo). (1).
 Rosbach, H. A. (Norvegujo). (1).
 Rosbach, J. H. (Norvegujo). (2).
 Rosseti, Reto, (Skotlando). (2).
 Sadler, Victor, (Anglujo). (2).
 Samyn, Albert, (Belgujo). (12).
 Seeman, Antoni, (Ĉeĥoslovakio). (1).
 Sekelj, Tibor, (Jugoslavio). (1).
 Skaljer-Race, Vesna, (Jugoslavio). (1).
 Slade, T. K., (Anglujo). (1).
 Smit, W. M., (Nederlando). (2).
 Societo E-ista Mulhouse, (Francujo). (1).
 Sola, Mario, (Italujo). (1).
 Staněk, Jofko, (Ĉeĥoslovakio). (1).
 Thévenin, Lucien, (Francujo). (1).
 Thorsen, Poul, (Danujo). (3).
 Trudić, Božidar, (Jugoslavio). (1).
 Urbanová, Eli, (Ĉeĥoslovakio). (3).
 Váňa, Vladimír, (Ĉeĥoslovakio). (2).
 Vančik, Božidar, (Jugoslavio). (2).

LAŬLANDA STATISTIKO DE PREMIITOJ

Anglujo 11	Germanujo. 2
Ĉeĥoslovakio 6	Nederlando 2
Jugoslavio 6	Aŭstrio 1
Francujo 5	Hispanujo 1
Italujo 5	Hungarujo 1
Skotlando 5	Japanujo 1
Norvegujo 4	Meksikio 1
Belgujo 2	Sudaŝtato 1
Brazilo 2	Svedujo 1
Danujo 2	Usono 1

60 diversaj premiitoj el 20 landoj.

☆

PER DIAPOZITIVOJ

TRAFA PROPAGANDO POR ESPERANTO

Du samideanoj el Francujo realigis, por sia propra propagando, serion da 48 diapozitivoj.

Ĉar la afero estas tre interesa, 50 samlandanoj, kaj kelkaj eksterlandanoj, petis por si kopion de tiu serio.

Ĝi ricevis unuaniman aprobon de la uzintoj.

Niaj samideanoj estas pretaj fari aliajn kopiojn, nur se venos al ili sufiĉe da mendoj.

Esperantistoj el pagi-povaj landoj sin turnu al LENTAIGNE, 3, av. Gaillarde, MONTPELLIER, Francujo, kiu sendos kromajn informojn.

☆

35a KONGRESO DE S.A.T. EN VIENO, AŬSTRIO, de 4-10 aŭgusto 1962

Aliĝis : 507 personoj el 18 landoj, ĉeestis fakte 465 el 16 landoj. La ĉefaj grupoj venis el Francujo, Nederlando, Germanujo, Aŭstrio, Jugoslavio (vicigitaj laŭ la nombro de la kolektivoj). Partoprenis 32 infanoj, por kiuj okazis aparta Kongreseto kaj kiuj promenis kaj faris vizitojn dum la laboro de la plenaĝuloj.

Ne nur la esperantista urbestro, **Franz Jonas**, sed ankaŭ pluraj eminentuloj salutis en la Malferma Soleno, la 5 aŭg., en la tre reprezenteca Sindikata Domego, Tretlstrateto (apud la Karlo-preĝejo). Inter ili D-ro **Wohlgemuth** por la Instrumministro, D-ro Frenzel, eksministro, prezidanto de Aŭstria Esp. Federacio, k-do **Niemitz** por la Naturamika Internacio. La Respublika Prezidanto, s-ro Schärp, kaj la Kanceliero s-ro Godbach, sendis salutleterojn.

Krom du laborkunsidoj, tri prelegoj (de Lucien Laurat, konsilisto Werner kaj Winkel-Schagen), "Forumo" kun tre interesa debato, okazis Muzika Artvespero (partoprenis du operkantistoj), rondveturado al la nova Vieno, tuttaga ekskurso al **Burgenlando**, kiu kondukis al Neusiedler Lake kaj eĉ ĝis la hungara landlimo, al Eisenstadt, kie aktivis Josef Haydn, al Carnuntum, antikva roma ruin-urbo, ktp.

La Kongresa Gvidrezolucio spegulas la aspirojn de la Asocio kaj bedaŭras ankaŭ la stultan sintenon de la nov-filologoj, kiuj antaŭ nelonge, ankaŭ en Vieno, esprimis malfavoran opinion pri Esperanto.

La Kongreso estis brila kaj kuraĝiga por ĉiuj.

Junularo estis proporcie multnombra ĉe tiu ĉi Kongreso; ili aktive partoprenis en organizado de la programo de la Adiaŭa Vespero; kaj ili postkongrese kunestadis unu semajnon en Naturamika ŝirmejo en la fama Viena Arbaro.

Venontjare SAT kongresos en Hamburgo (dato ankoraŭ ne fiksita, sed verŝajne en la dua duono de julio).

Kies lingvo estas Esperanto?

Antaŭ dudek jaroj, nia tiama registaro asertis, ke la komunistoj estas fihomoj kaj eĉ mi jam komencis kredi ĝin.

Sed samtempe la magistratoj deklaris, ke Esperanto estas la lingvo de la komunistoj kaj mi ekpensadis: "Esperanto estas sendube tre bona kaj utila afero. Se ĝi estas la lingvo de la komunistoj, tiam la komunistoj devas esti tre saĝaj kaj bravaj homoj".

Poste venis la hitleraj tempoj. La hitleristoj asertis, ke la hebreoj estas fihomoj kaj eĉ mi jam komencis kredi ĝin.

Sed samtempe la magistratoj deklaris: "Esperanto estas sendube tre bona kaj utila afero. Se ĝi estas la lingvo de la hebreoj, tiam la hebreoj devas esti tre saĝaj kaj bravaj homoj".

Poste venis la nuna tempo. Niaj oficialaj rondoj asertis, ke la kapitalistoj estas fihomoj kaj eĉ mi firme kredis ĝin.

Sed samtempe, en la 1956 novembra numero de la Pacdefendanto mi legis, ke la plzenaj magistratoj malpermesis la aperon de la gazeto, deklarante, ke Esperanto estas la lingvo de la kapitalistoj kaj mi

Nu ne! Mi jam delonge ne kutimas ekpensadi, mi tute senkulpiĝas. Mi nur venis al la ideo:

Oportune estus, se la magistrato de Plzen foje kunsidus kun la kapitalistoj kaj kun sinjoro Ben Gurion, la ministroprezidento de Israelo kaj fine ili decidus, kies lingvo estas Esperanto?

Ĝis la decido ni estas en plena embaraso, nesciante, al kiu ni ŝuldas dankon kaj estimon.

Sano Plaček

Savu niajn librojn!

La esperantaj libroj ordinare estas eldonitaj en relative malgrandaj eldonnombroj, kaj disvastiĝas tra la tuta mondo. La natura sekvo de tio estas, ke, kiam verko elĉerpiĝas ĉe la vendejoj, ĝi estas preskaŭ tute ne plu trovebla de la novaj esperantistoj. Multajn niajn klasikaĵojn kaj gravajn librojn oni vane serĉas, ankaŭ ĉe la brokantistoj. Studantoj de nia lingvo, kaj tio inkluzivas kandidatojn por niaj superaj ekzamenoj, ne povas ĝisfunde studi nian kulturon nek taŭge sin pretigi por ekzameniĝo, pro manko de necesaj elementoj, nome de elĉerpitaj eldonaĵoj. Tre malmultaj en la mondo estas eĉ relative kompletaj bibliotekoj de esperantaĵoj. Oni pensas pri la bibliotekoj de: la brita asocio; UEA; kaj IEMW.

Multaj individuaj esperantistoj posedas pli aŭ malpli grandajn kolektojn. Sed ĉiuj individuoj devas iam morti; kaj kio okazas poste pri la amita kaj zorge konservita kolekto? Tro ofte la parencoj, indiferentaj aŭ, pli verŝajne, ne sciante kion fari pri la libroj, ilin simple elĵetas. La redaktoro de "Esperanto" mem, antaŭ multaj jaroj, elfosis el rubejo valoran kolekton de esperantaĵoj tien ĵetitan de la tute ne malicintencaj parencoj de mortinta samideano. Sendube nekalkuleblaj miloj da libroj perdiĝis en similaj rubejoj. Alia samideano testamentis sian kolekton al Universitata Biblioteko; la libroj ja troviĝas tie, sed ili estas konsulteblaj nur de la anoj de tiu universitato, kaj praktike utilas al tre malmultaj personoj. (Ili do estas savitaj, sed, en la nuna stadio de nia afero, ne tiel utile savitaj, kiel ili povis esti. Iun tagon la universitato estos fieraj pri sia bonŝanco, sed ankoraŭ ne.)

La Estraro de UEA do urĝe petas ĉiujn samideanojn certigi JAM NUN la estontecon de siaj libroj. Kiu ne plu deziras reteni iujn librojn, kaj ne havas privatajn motivojn por alimaniere disponigi ilin, tiu sendu la librojn al UEA. Ĉiuj aliaj, kiuj havas librojn, certigu NUN, per testamento aŭ alia certa garantiaĵo, ke post la morto la libroj iros al UEA. Tiamaniere ili grave helpas la movadon. La biblioteko de nia Asocio estos kompletigita;

krom tio, tiujn librojn, kiujn la Asocio jam havas, ĝi disponigos al aliaj esperantistoj, por ke niaj verkoj daŭre estos uzataj, kaj ne perdiĝos por ĉiam.

La Estraro substrekas la gravecon de tiu ĉi alvoko, kaj anticipe dankas tiujn membrojn, kiuj atentos pri ĝi.

Helpinda samideanino

28-jara f-ino Claudette Toro jam de dek jaroj estas blinda kaj paralizita, kaj krome suferas dolorojn pro artrito. Se tamen vi supozas, ke tiu ĉi artikoleto celas veki vian kompaton, vi eraras. Kun mirinda kuraĝo f-ino Toro multe laboras por Esperanto, ne nur inter blinduloj sed ankaŭ inter vidantoj. La helpo, kiun ŝi bezonas, estas agrabla: ŝi serĉas, nome, korespondantojn por siaj ok ĝisdekdujaraj lernantinoj (vidkapablaj), kies foton vi vidas ĉi-kune.

Antaŭ tri jaroj f-ino Toro lernis Esperanton per la brajlaj kursoj haveblaj de la Hadley Koresponda Lernejo por Blinduloj en Winnetka, Illinois, (Usono). Nun ŝi laboras por ili, gvidante el sia hejmo ĝuste tiujn kursojn, kiujn ŝi antaŭe studis. La kursoj (unu por komencantoj kaj alia por progresintoj) estas haveblaj tute senpage al blinduloj, kiuj scipovas la anglan brajlan sistemon. La lernejo pruntedonas la lernolibrojn al ĉiuj gelernantoj, kaj nuntempe ŝia grupo konsistas el blinduloj ne nur el Usono, sed ankaŭ el Kanado, Novzelando, Hindujo kaj Cejlono.

En la pasinta jaro ŝi starigis en sia urbo klubon de Esperanto por vidantaj infanoj. La unuan kurson partoprenis naŭ knabinetoj. La 30an de majo 1962 ili havis festeton kun speciala programo por la patrinoj, gefratoj kaj kelkaj geamikoj, por fini la unuan kurson. Por tiu grupo ŝi ricevis korespondantojn el 18 landoj.

Nova kurso komenciĝis kun dek knabinetoj, kiuj deziras korespondi kun geknaboj en la tuta mondo. Kiu helpas tiamaniere nian kuraĝan samideaninon? Ŝia adreso: F-ino Claudette Toro, Hadley Esperanto Courses, Box 166, San Germán, Puerto Rico.



NIA FORUMO

LANDNOMOJ

Manko de kritiko kutime estas laŭinda por eviti konjektojn pri la afero diskutata. Falsa optimismo, tamen, estas danĝera.

Mi aludas la multe trovatan opinion, ke ne grava estas la problemo de Esperantaj landnomoj. Ŝajnas, ke oni povas forgesi ĉi tiun disputon, ĉar kion ajn oni skribas aŭ diras, ĉiuj komprenos.

Tamen, ĉi tiu temo ja estas grava pro la jenaj kialoj.

1) Oni uzas landnomojn en Esperanto des pli ofte pro la internacia naturo de la lingvo.

2) La neesperanteco de la fakto, ke oni povas esprimi unu landon per du ĝis ses vortoj, donas al niaj malamikoj kompreneblan mokeblaĵon.

3) Ne ekzistas pli evidenta komenco oficiala aplikado de Esperanto ol la ekuzo de neŭtrala landnoma sistemo ĉe poŝtoŝtupoj, sur internaciaj dokumentoj, por aŭtomobilaj identigaj platoj, aŭ kie ajn unu landnomo estas komprenenda en aliaj landoj; malfeliĉe, ni hontas rekomendi tion, ĉar ni mem ne estas decidintaj.

4) Nun, unu aŭ du ekzemplojn oni ne povas kompreni, ĉar ankoraŭ neniu decidis, ĉu ili apartenas al la sistemo de la nova aŭ la malnova mondo; ekzemple, estas dubo, sen kuntekso, pri la signifoj de Egipto, Vjetnamo kaj eĉ Koreo.

Mi ne ĉi tie proponu solvon. Mi simple petu, ke la Esperantistaro, kaj precipe tiu instanco, kies devo estas protekti la lingvon, la Akademio, konsideru la problemon grava, solvebla kaj tuj solvenda.

C. J. McMullen

MORSKODO

Kiel aktiva radioamatoro, ŝajnas necese al mi, ke tiuj esperantistoj, kiuj uzas la morskodon, ĉu profesie, ĉu amatore, devas, kiel unua paŝo, sin organizi aŭ intertrakti por la celo proponi, argumenti kaj fine difini esperantan morskodon.

S-roj McMullen kaj Chaisnot faris iniciatan laboron, sed kiel okazis, ke la respektivaj proponoj tiel malsamas? Kiun uzi? Persone, mi preferas la proponon de L-to McMullen ĉar ĝi estas pli laŭsistema, bazita sur la jam funkcia kodo de la serbokroata lingvo, dum la propono de S-ro Chaisnot ŝajnas iom arbitra.

Tamen, la proponon de L-to McMullen pri interpunkcio mi tute ne ŝatas. Laŭ usona radioamatora uzado, la sistemo de interpunkcio estas laŭ "internacia (kontinenta) morskodo". Se tio estas vere internacia, kial ni ne uzu tion?

E. H. Royer
WA6PSA

NOVA LITERUMA ALFABETO MIOPEGA DECIDO

La supremenciitan artikolon en ES-
PERANTO (numero de Julio, 1962), mi
tralegis kun granda intereso. Kvankam mi nuntempe ne havas profesion
intereson en la radio-telefono, en
antaŭaj tempoj, mi estis aernavigisto
en la brita aerkorpuso.

Pri la historio de la nova aboco, la
skribisto iom malpravas. Fakte, ĝi
estis la alfabeto adoptita por la aer-
trafiko ekde la 1-a de marto, 1956, laŭ
decido de la ICAO (International Civil
Aviation Organisation = la Interna-
cia Organizaĵo de la Nemilita Aviado).
Ĉar la usonaj aerlinioj estis la plej
grandaj reprezentitaj en la ICAO,
estas eble ke la usonaj anoj superre-
gis la opiniojn de la alilandaj repre-
zentantoj. La decido plivastigi la
uzadon de la alfabeto ICAO al la
marista radiotelefona reto estas lo-
gika, kvankam ne pruvo ke la alfa-
beto estas la plej taŭga por la inter-
nacia uzo.

Laŭ mia kono ekzistas internacia
komisiono pri la radio-komunikado.
Ĉu tiu instanco ne faris proteston kon-
traŭ la adoptiĝo de la alfabeto ICAO
kiel internacia aboco?

David Withey

PEKAJ PRETERLASOJ

Trafoliumante kelkajn jarkolektojn
de nia gazetaro, ni abunde trovas scii-
gojn pri bonegaj ideoj, imitindaj
iniciatoj, sed vane ni serĉas sciigojn
pri ties imitado kaj utiligo. Ni vidu
nur kelkajn el ili, kaj tuj ni devas
konfesi, ke ne nur mono mankas por
propagandi, sed ankaŭ volonte! Jen:

1. Kiel bonega ideo estis ekzemple la
telefona interpretado! Ĉu disvastiĝis?
Ne! Kial?

2. Antaŭ kelkaj jaroj en la jarlibro
aperis adresaro de E. kluboj. Bedaŭ-
rinde ĝi iĝis de jaro al jaro malpli
ampleksa. Ni havas 1500 E.-klubojn!
Se ĉiu klub-prezidanto plenumus sian
devon, nia jarlibro estus multe pli
ampleksa kaj taŭga por propagando.
Krome UEA. havus minimume 3-4000
guld. pli da enspezo ĉiujare.

3. En 1958. H. de E. ĝoje anoncis, ke
la enketo, — iniciatita de la ĉefur-
bestro Franc Stein, Mainz, alportis
brilan rezulton: 581 deklarojn de
urbestroj, favore al E. Bedaŭrinde
ankaŭ tiu ĉi sukceso restis nur mo-
rala! Kvankam la afero jam iom ma-
laktualiĝis, la delegitoj kaj klub-
prezidantoj povus ion entrepreni.
Nome kolekti monon por aperi en
la jarlibro, — sub titolo: "Amikoj de
Esperanto" — la plenpaĝan portreton
de ĉiu urbestro. Poste malgranda de-
legacio devus danki pro la favora
deklaro, kaj samtempe prezenti la
jarlibron. Tiamaniere estus kreata
bona kaj rekta rilato inter la movado
kaj la urba gvidantaro, kiun lerta
klub-prezidanto okaze povus mult-
flanke utiligi!

4. Ĉu mi menciis la kelkcentmil ri-
fuĝintojn, la plej taŭgan medion por

propagandi? Per laŭplana kaj sistema
vizitado, morala helpo, ni povus mi-
lojn kaj milojn Esperantigi, aŭ alme-
naŭ igi Esperantemaj!

5. Fine, sed ne laste! Mag. W. Auld
en la jaro 1958 (antaŭ kvar jaroj!)
donis en la manon de la Esperantis-
taro armilon taŭgan por rebati ĉiun
argumenton de la "ĉiam pli pruden-
taj"! Plenkongreke li klarigis, kiel
erara estas la klopodo de tiuj, kiuj
la solvon de internacia lingvo esperas
trovi per prerogativo de iu nacia
"mondlingvo". Lia artikolo: "Ĉu pre-
fere nacilingvo?" estis destinita por
esti tradukita al ĉiu nacia lingvo, kaj
aperigita en la naciaj gazetoj! Sed
kio okazis? Nun tio ŝimas en la jar-
kolektoj kaj en la Esperanto Muzeo.
"Esperanto-Propagando, Lund"

48-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Sofio, 3-10 Aŭgusto 1963

Sub la Alta Protektado de la Bulgara
Ĉefministro Anton Jugov.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 1

Rotterdam, la 1-an de septembro 1962
Kotizoj ĝis la 31-a de decembro 1962
Kongresano

	n.gld.	40.00	b.lev.	14.00
Edz(in)o de kongresano	n.gld.	20.00	b.lev.	7.00
Junul(in)o ne pli ol 20-jara	n.gld.	15.00	b.lev.	5.00
Student(in)o de 20 ĝis 30-jara	n.gld.	25.00	b.lev.	8.50
Blinduloj kaj ties gvidanto	n.gld.	20.00	b.lev.	7.00

Laŭ decido de la Komitato de U.E.A.,
gvidanto de blindulo rajtas ne pagi la
aliĝkotizon.

Individua membro de U.E.A. (t.e. ri-
cevis minimume la Jarlibron) rajtas
rabaton de 5.00 n.gld. (1.60 b.lev.).

Edz(in)o de membro rajtas rabaton
de duono de tiu sumo.

La rabato ne validas por la aliaj kate-
gorioj.

Konstanta Adreso

La Konstanta adreso de la 48-a U.K.
estas: ĉe U.E.A., Nieuwe Binnen-
weg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

La aliĝiloj kaj ĉiuj kotizoj estu sen-
ditaj al la oficialaj Kongresaj Peran-
toj aŭ rekte al la Centra Oficejo de
U.E.A.

Nur la bulgaraj aliĝantoj sendu la
aliĝilojn al: 48-a Universala Kongre-
so de Esperanto, Sofio, kaj la kotizojn
al: Bulgara Nacia Banko, Sofio.

GRAVE!

a) Ofte ni ricevis monon sen iu ajn
indiko pri ĝia celo. Kelkfoje venas
mono ankaŭ por la kredito de kongre-
sanoj, sen indiko pri nomo aŭ kon-
gresnumero. Por ke ne okazu neevite-
blaj eraroj pro tio, ni petas ke ĉiu
monsendo estu akompanata de klaraj
kaj kompletaj indikoj. Kiam la
monsendo rilatas al kredito de kon-
gresano, estu nepre klare indikitaj la
kongresa numero kaj la nomo. Spe-
cialan pekon ni havas per tiuj kon-

gresanoj, por kiuj aliaj personoj sendas monon. Ili nepre instrukciu la pagonton, ke li skribu klare kaj komplete ĉiujn necesajn indikojn.

b) Multe helpas al glata funkciado, se en leteroj pri la kongreso oni ne tuŝu aliajn temojn ne koncernantajn la kongreson, kaj, inverse, en leteroj al la C.O. pri iuj ajn temoj ne enmiksi prikongresajn aferojn. Eĉ malgrandajn informojn aŭ demandojn skribu sur apartan paperon.

c) Fine ni atentigas ke aliĝiloj ne klare skribitaj ne estos traktitaj.

Kongresejo

La Kongresejo de la 48-a U.K. estos la Ŝtata Universitato en Sofio.

Unua Bulteno

La 8-paga elegante eldonita Unua Bulteno de la 48-a Universala Kongreso, kun bildoj pri Sofio, listo de Perantoj kaj provizora programo, estas senpage ricevebla, kune kun la aliĝilo, ĉe la Perantoj kaj ĉe la C.O. de U.E.A. 19-a I.J.K.

La 19-a Internacia Junulara Kongreso okazos en Vraca (Bulgarujo) de la 27-a de julio ĝis la 3-a de aŭgusto 1963. Okaze de la 19-a I.J.K. estas anoncita de la junulara sekcio de Bulgara Esperantista Asocio Enketo/Konkurso je la temo: "Kion vi scias pri la lando de la 19-a TEJO-Kongreso?" La enketon povas partopreni ĉiu esperantisto ĝis 30-jaraĝa, kiu respondas al la jenaj demandoj:

1. Kiu verko el la bulgara literaturo plej multe impresis vin, kial kaj en kiu lingvo vi legis ĝin?
2. Kion vi scias pri la bulgara historio de la jaroj 1876-1878?
3. Kiom da elektroenergio produktis Bulgarujo dum 1939, dum 1945 kaj dum 1961?

Inter la partoprenantoj al la enketo estos disdonitaj dekdu premioj, el kiuj du senpagaj partoprenoj en la 19-a I.J.K.

La respondoj estas sendendaj al "Internacia enketo, P.K. 587, Sofio, Bulgarujo".

Lasta limdato: 30.IV.1963.

Por Britaj Aliĝontoj

Car Brita Esperanto-Asocio ne plu funkcias kiel Kongresa Peranto, la britaj aliĝontoj bonvolu sendi la aliĝilojn rekte al la C.O. de U.E.A. en Rotterdam.

La aliĝkotizo povas esti pagita per brita poŝtmandato aŭ bankĉeko, sendendaj al la C.O. de U.E.A. kun la aliĝilo.

Statistiko (ĝis la fino de aŭgusto)

Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 1, Belgujo 2, Brazilo 2, Britujo 16, Bulgarujo 18, Danlando 6, Finnlando 5, Francujo 27, Germanujo 9, Hispanujo 3, Hungarujo 2, Israelo 1, Italujo 6, Japanujo 3, Jugoslavio 13, Nederlando 8, Norvegujo 3, Nov-Zelando 1, Pollando 4, Svedujo 12, Svisujo 2, Usono 1.

Entute 147 el 24 landoj.

G. G. Pompilio

Konstanta Kongresa Sekretario

Tra la Mondo

Aŭstrujo

● **Emerita lernejdirektoro Franz Föttinger**, AEF-liglandestro kaj prezidanto de la Esperanto-societo "Verda Stelo" en Salzburg, pro siaj meritoj pri la akcelado de la turismo en la Festivala Urbo ricevis la honortitolon "Bürger der Stadt Salzburg", t.e. "Burĝo de la urbo Salzburg". Dum ĉeesto de la tuta urbestro la 6an de junio urbestro Kommerzialrat Alfred Bäck transdonis al li honoran diplomon. Dankinde al la klopodoj de s-ano Föttinger la Esperanto-prospektoj pri Salzburg estis plurfoje reeldonitaj en kvanto de po 10.000 ekzempleroj. La varba efiko de tiuj ĉi belegaj kaj ampleksaj propagandiloj kaj ankaŭ la preleg-vojaĝoj, kiujn s-ano Föttinger faris, prezentante siajn belajn lumbildojn, venigadas multajn geesperantistojn en la faman Mozart-urbon. La eksterordinara honorigo ekzemple montras konkretan utiligon de Esperanto kaj ties agnoskon fare de publika aŭtoritato.

● **Du ilustritaj prospektoj pri Vieno** havas aldonitan esperantan tekston, kaj estas ricevablaj (kune kun du aliaj pri Aŭstrujo) kontraŭ 1 resp. kup. de Internacia Esperanto-Muzeo, Wien I, Hofburg, Aŭstrujo.

Brazilo

● **Okaze de la inaŭguro de Placo D-ro L. L. Zamenhof kaj Strato Esperanto en Jundiaí**, la loka grupo deziras starigi grandan ekspozicion, kaj petas alsendon de esperantaĵoj al: Rua Secundino Veiga, 119, Jundiaí, São Paulo.

Britujo

● **S-ro Maurice Lewin**, komitatano de B.E.A. kaj sekretario de la Esperantista Veterana Klubo, tre vigle laboris por "Esperanto en la lernejojn". Dum la pasinta printempo li faris paroladojn pri Esperanto en 17 lernejoj al proks. mil aŭskultantoj. Li

alparolis ankaŭ unu-du Rotariajn Klubojn.

● **La Urbestro de Dunstable**, s-ro Haydn W. Parrott estas esperantisto, laŭ raporto en la loka gazeto. Esperanto-kurso kun du klasoj okazis dum la printempo en la urba Kolegio, kaj daŭriga kurso okazos dum la aŭtuno.

● **2a Markola Kongreso** okazos en Dovro je pasko 1963. Por informoj oni sin turnu al la kongresa sekretario, s-ro Norman H. Smith, 14B Castle Avenue, DOVER, Kent, Anglujo.

● **"Esperanto en la komerco"** (vd. recenzon en nia maja numero) estas havebla de S-ro Louis Romania, 43 Kirklington Road, Marden Estate, NORTH SHIELDS, Northumberland, kontraŭ 4 ŝ., afrankite.

Cejlono

● **D-ro Victor Sadler**, sendito de UEA en Cejlono, alvenis tien la 9. julio. Radio Cejlona kaj ĉefurbaj ĵurnaloj, kiuj ambaŭ anoncis liajn alvenon kaj celojn, daŭre interesiĝas kaj akceptis artikolojn kaj paroladojn pri la Internacia Lingvo. Centoj da geinstruistoj, studentoj kaj lernejoj ekaŭdis pri Esperanto, kaj rezultis pluraj intensivaj kursoj. Ekfunkciis ankaŭ persona instruado kaj koresponda kurso. Vortareto Esperanta-Sinhala aperos fine de Septembro. Dum Oktobro D-ro Sadler donos kelkajn prelegojn en Kalikato, antaŭ ol revojaĝi Eŭropon.

Ĉeĥoslovakio

● **Okaze de la Tutmonda Ekspozicio de Poŝtmarkoj** en Prago oni eldonis oficialan poŝtkarton kun teksto en Esperanto. En la ekspoziciejo deĵoris s-ano Bartošik kiel esp-interpretisto, kaj la esp-poŝtmarkoj vekis grandan intereson.

Danujo

● **30 personoj el 7 landoj** partoprenis la 4an Geografian Semajnon en Odense, Danlando, 26/7 — 4/8, sed kun gastoj unu- aŭ plurtagaj ĉeestis pli ol 50 personoj por aŭskulti dek altnivelajn prelegojn kaj rigardi 15 sonfilmojn, el kiuj 6 esp-lingvaj. Okazis dana, nederlanda kaj franca vesperoj kun



Nova Esperanto-strato en Trofarello. (vd. sub "Italujo").



S-ro Chr. Solomonidis, *Generala Sekretario de la Edukministrejo* (meze) kun grekaj esperantistoj (vd. Sub "Grekujo")

demanda forumo, kaj oni faris tri belegajn ekskursojn. La esperantistaj geestroj de la etbienula alternejo preskaŭ dorlote zorgis pri ĉiuj bezonoj kaj la lastan vesperon feste akceptis ĉiujn en sia hejmo.

Francujo

- Responde al petoj de franca aŭskultanto, la **Brita Radio dediĉis du elsendojn** al esperanto kaj leĝoprojekto Woodburn.
- **"La plej ĝentila ŝtat-funkciulo"** estis solene proklamita de la Pariza urbestro. Temas pri Sro Marcel MOLLION, prezidanto de kultura internacia asocio de fervojistoj, fervora amiko de esperanto.
- **"Tydognik Polski"**, pollingva gazeto eldonata en Francujo, raportis pri vizito ĉe komerca foiro de Lille kaj sciigis, ke lernolibroj por Poloj estas haveblaj ĉe M.E.D.C.A.P. — 23 Rue Taitbout, Paris 23e.
- **Pli ol 88.000 respondoj** trafis la oficejojn de bank-firmao, kiu organizis skriban kaj radiofonian konkurson pri 15 "nekonataj" famuloj, i.a. Dro Zamenhof.
- Duafoje, la **klubo de Valenciennes** (Nord) akceptis esperantistan grupon el Düren (Germanujo).
- **E-angulo** ekaperis en la liberpensula gazeto "LA RAISON", Herblay (Seine-et-Oise).
- Tiun ĉi lernjaron, **du kursoj funkciis en la liceo de Montélimar**. La kursojn sekvis dudeko da gelernantoj. Dum Novembro 61, oni organizis feston en kinejo antaŭ multnombra publiko. En la programo estis filmo kaj ankaŭ teatraĵo ludita (franclingve) de du lernantoj de la Esperanto-grupo. Per tiu mono ni povis organizi ekskurson al Barcelono, je favora prezo por la membroj de la grupo. Ankaŭ neesperantistoj partoprenis la ekskurson kiu okazis de la 14a ĝis la 18a de Julio. La restado en Barcelono estas kontentige organizita de Sro Ayala Gomez, UEA delegito en Barcelono.

Plie rekompence al la du junuloj kiuj ludis okaze de la festo, la prezidanto de la Esperanto-grupo kondukis ilin en sia aŭtomobilo ĝis KOPENHAGO. La loka Esperanto-grupo pagis iliajn aliĝojn al la Kongreso kaj parto de iliaj elspezoj.

Okaze de la oficiala disdono de premioj al la plej bonaj gelernantoj de la liceo, ankaŭ estis premioj al la du plej bonaj gelernantoj de la Esperanto-kurso. La libroj "Bildlibro pri bestoj" kaj "Amuzo per scienco" estis donaco de la Esperanto-grupo. Sur la podio, antaŭ la prefekto, Deputito-urbestro, Senatoro, Liceestro kaj Profesoroj de la Liceo, la laŭreatoj: Fino Cellier kaj Sro Pleiser, ricevis la librojn de Sro Llorens, profesoro en la liceo, prezidanto de la Esperanto-grupo kaj instruanto de Esperanto en la Liceo.

● La Droma Esperanta Federacio petis la du ĉiutagajn ĵurnalojn de la regiono "LE DAUPHINE LIBERE" de GRENOBLE kaj "LE PROGRES" de LIONO malfermi **poresperantan ĉiunmonatan kronikon**. La du ĵurnaloj, ankaŭ la lokaj ĵurnaloj de MONTE-LIMAR kaj DE ROMANS akceptis tiun kronikon kiu regule aperas de post Decembro '61. La enhavo, ĉirkaŭ 100 ĵurnallinioj, rilatas kun la novaĵoj pri la diversaj grupoj de la regiono kaj ankaŭ kun la ĉefaj eventoj en la esperanta movado. Respondeas pr, tiu kroniko S-ro LLORENS, U.E.A. delegito de MONTE-LIMAR.

● **1512 gelernantoj de 66 lernejoj per 96 kursoj** lernis Esperanton en la francaj lernejoj dum la lernejjaro 1961-62, laŭ statistiko kompilita de komisiito de Franca Esperanto-Unuiĝo s-ro R. Blanc. Ili estis 102 gelernantoj de 8 elementaj lernejoj, 520 de 18 mezlernejoj, 112 de 7 specialaj lernejoj, 425 de 22 liceoj, kaj 353 de 11 instruist(in)aj seminarioj.

● **Regiona renkontiĝo** okazos la 7an de oktobro en Amiens. Fervojajn kon-

gresrabilojn sendas F-ino Mauchien, 10 rue de Noyon, Amiens (Somme).

● **Turisman broŝuron** kun teksto ankaŭ en Esperanto eldonis Union Départementale S. I. Allier, Place de l'Hôtel-de-Ville, Moulins, sub titolo "Feu Vert pour le Bourbonnais".

Germanujo

● **Eŭropa Lingvo-Kampanjo**. Post longjaraj klopodoj de d-ro Herrmann kaj aliaj en la eŭropfederalista movado, la Prezidantaro de la Eŭropa Unio Germanujo formis komisionon el inter siaj membroj por la studado de la eŭropa lingvo-problemo kun speciala konsidero de la avantaĝoj, kiujn nia Internacia Lingvo povus doni kiel komuna eŭropa lingvo. Tiu tre laŭdinda decido povos eble havi tre gravajn konsekvencojn. Tial estas oportune, ke niaj amikoj en la Esperanto-Movado kuraĝigu la laborojn de la komisiono per afablaj leteroj; ĉar en la Prezidantaro estas forta kaj influa grupo, kiu kontraŭas niajn intencojn. Oni skribu al jena adreso: Europa Union Deutschland, Generalsekretariat, Bonn/Rhein, Stockenstrasse 1-5, Fed. Resp. Germanujo. Nepre ne menciui la nomon de d-ro Herrmann, nek tiun ĉi informon!

● **Kontraŭ doloro helpas bona humoro**. Sub tiu devizo nia samideano Alexander STARKE (Nürnberg, Armin-Knab-Str. 12, Germanujo), aktoro kaj recitisto, prezentis la 23an de junio sian gajigan literaturan programon "La Rido de l' Mondo" ĉe la Esperanto-Grupo Nürnberg. Tiu deklamvespero estis plena sukceso, kvin lokaj ĵurnaloj favore raportis pri ĝi. "Pri la esprimkapableco de la internacia lingvo Esperanto atestis 'La Sorĉo-lernulo' de Goethe en Esperanto" skribis la ĵurnalo "Nürnberger Zeitung".

La programo, kiu enhavas fabelojn, popolkantojn, poemojn kaj esperantajn humoraĵojn, prave pretendas esti mondskala laŭ elekto kaj prezentado. La unuopaj eroj estas ĉerpitaj el la literatura trezoro de 11 landoj en Eŭropo kaj Azio, kaj ankaŭ el la originala Esperanto-literaturo mem, krome ĝi jam estis prezentita pli ol 60-foje en 8 landoj. Sed ne nur la literaturaĵoj kaj humoraĵoj igas la programon valora kaj ĝuinda, plej multe kontribuas por tio la majstreca kapableco kaj impresiga gestriceco de la recitisto mem. Ĉi tiujn artajn kvalitojn Starke jam montris en multaj Esperanto-teatraĵoj dum kongresoj: 1923 li ludis la rolon de la "Monaĥejo" en "Natan la Saĝulo" kaj 1930 li brilis kiel "Babberley" en "Onklino de Charley".

● **Iniciate de fervojistoj kaj UEA-delegitoj, kunvenis en Frankfurt** gastoj el Japanujo (2), Francujo (2), Hungarujo, Jugoslavio kaj Germanujo.

Grekujo

● **Cirkuleron pri libervola instruado**

de Esperanto en la grekaj lernejoj subskribis s-ro Chr. Solomonidis, Ĝenerala Sekretario de la Ministerio de Nacia Instruado la 26an de junio 1962. La cirkulero, sendita al ĉiuj lernejoj, rekonas la valoron de la Internacia Lingvo kiel rimedo de spirita kontakto inter la popoloj kaj de interkonatiĝo kaj interfratiĝo; permesas la instruadon de la lingvo; kaj rekomendas, ke la lernejoj direktoroj atentigu siajn studentojn pri ĝia signifo

Hispanujo

● **XXIII-a Hispana Kongreso de Esperanto.** En la kastila urbo VALLADOLID, de la 24-a ĝis la 28-a de julio okazis kun granda sukceso la indikita Kongreso. Partoprenis preskaŭ 300 gesamideanoj, inter ili kelkaj eksterlandanoj el Usono, Japanujo, Francujo, Belgujo, Portugalujo, k.t.p.

La lokaj Aŭtoritatoj bonege akceptis kaj apogis la Kongreson kaj partoprenis la ĉefajn kunvenojn. La urbestro ricevis la kongresanaron ĉe la Urbodomo kaj regalis ilin per trinĵaĵo.

Jen la plej interesaj kongreseroj: Sankta Meso en Nia Sinjorino La Antigua kun Esperanta prediko fare de Pastro Dro J. Casanovas; inaŭguro de strato ESPERANTO; prelego en Esperanto de Akademiano Sro. Delfi Dalmáu kaj alia en hispana lingvo por la ĝenerala publiko fare de Profesoro Miguel Sancho Izquierdo, Honora Rektoro de la Zaragoza Universitato; ekzamenoj al kiuj partoprenis 18 gesamideanoj; vizito al la aŭtomobila fabriko FASA; vizito al la ĉefaj lokaj monumentoj, k.t.p. kaj speciale tre interesaj kaj fruktodonaj laborkunsidoj.

● **La Moŝta Provinca Deputitaro el Barcelona,** ĵus destinis 30.000 pesetojn (6.000 stelojn) por subvencii INSTITUTO-n DE ESPERANTO en la indikita urbo. La Kultura Komisiono de la menciita grava organizaĵo, en kunveno de la 24-a de julio, favore akceptis la peton prezentitan de Sro. J. Ma Solé Saldaña, Prezidanto de INSTITUTO DE ESPERANTO.

Ĉi tiu apogo fakte signifas la oficialan rekonon, fare de la Moŝta Deputitaro al la sindonaj, trafikaj kaj efikaj laboroj de INSTITUTO DE ESPERANTO en la kultura kaj esperantista kampoj dum la lastaj jaroj. Samtempe ĝi montras la amikajn rilatojn kiuj inter ambaŭ organizaĵoj jam ekzistas de longa tempo.

Nome de la barcelonaj esperantistoj kaj ankaŭ de ĉiuj la hispanaj, niajn sincerajn dankojn al Sro. Andrès BRUGUES Llobera, Deputito-Prezidanto de la (Eduka Komisiono) COMISION DE EDUCACION de la Excm. Diputación Provincial — BARCELONA (Hispanujo).

● **Radio Juventud** de la urboj Barcelono, Madrido kaj Eibar diaŭdigis informojn pri la E-movado. Speciale

radio Eibar intervjuis la gvidanton de la E-kursoj en Eibar.

● **Sabadell** estis la kadro de la 1-a Hispana Junulara Esperanto-Renkontiĝo; partoprenis 80 esperantistoj; el ili 50 gejunuloj. Dum la laborkunsido la ĉeestantaro aprobis la 1-an Laborplanon de H.E.J.S.

Hungarujo

● **I-a Hungara Somera Esperanto-Universitato en urbo Gyula.** De la 1-a ĝis la 4a de julio okazis en la urbo Gyula la I-a hungara Esperanto-Universitato, kun partopreno de pli ol 130 geesperantistoj. Ĉe la malfermo parolis k-do Sándor G. Enyedi, prezidanto de la urba konsilantaro, kaj s-ano Mihály Dumitrás. Prelegis en la universitato Paŭlo Balkányi pri "La rolo de Esperanto en la mondpaco"; Julio Baghy pri "La historio kaj estonto de Esperanto"; Imre Kádár pri "La historio kaj fameco de urbo Gyula"; prof. Ernő Farkas pri "Esperanto en la lernejo"; D-ro Bálint Szemenyei pri "Niaj eksterlandaj interrilatoj kaj ties signifo"; kaj s-ino T. Borbála Szerémi pri "La rolo de Esperanto en la laboristmovado". Ĉe la solena fermo parolis s-ano Zsigmond Papp kaj s-ano Sándor G. Enyedi: poste sekvis k-do István Jámbo, la sekretario de Urba Partia Komitato, kiu esprimis sian konvinkiĝon, ke Esperanto estas vere la lingvo internacia, la lingvo de la laboristaro kaj paco. Li proponis la instruon de Esperanto en la lernejoj kiel deviga lernobjekto. Fine li esprimis sian esperon, ke la Hungara Esperanto-Asocio akceptos la decidon de urbo Gyula, kaj en la estonteco ĉiujare en Gyula okazos la Somera Esperanto-Universitato.

● **Abiturientaj ekzamenoj** okazis ĉi-jare la unuan fojon en gimnazio "Ferenc erkel" (Gyula) ankaŭ pri Esperanto.

Italujo

● **Dum la 29-a Internacia Katolika Esperanto-Kongreso** de 14-21 aŭg. 1962 en la Centro Pio XII ĉe Romo pritraktis P. H. Wannemakers S. J. (Nederlando) kaj sac: prof. L. Thalmaier (Germanujo) la lingvan problemon de la Katolika Eklezio.

La kongresanoj poste faris la rezolucion: "La kongresanoj agnoskas la valoron de la lingvo latina por la vivo de la Katolika Eklezio. Sed ili estas konvinkitaj, ke pere de la lingvo latina ne estas solvataj ĉiuj problemoj de la supernacia kunlaboro de diverslingvaj katolikoj, ĉar la plej granda parto de la kredantoj neniam havos la eblecon kaj la tempon por studi la latinan lingvon. Por ke ili ne estu kondamnitaj al silentado dum internaciaj katolikaj kongresoj, ni rekomendas al ili la latinon de la popolo, tio estas ESPERANTO, facile lernebla kaj ĉefe baziĝanta sur vortradikoj latindevenaj. Do en la katolika mondo

prave ekzistu la 2 lingvoj: Latino kaj Esperanto, kiuj ambaŭ ĉiu sur propra tereno servas la interesojn de la Katolika Eklezio!"

● La 17an de junio okazis en Trofarello (apud Torino) **fondo de nova Esperanto-strato**, kiun partoprenis ĉirkaŭ 100 gesamideanoj el 10 italaj urboj krom unu hungara kaj unu germana samideanoj. Ĉeestis ankaŭ multaj neesperantistoj de Trofarello kaj de najbaraj urboj Torino kaj Moncalieri. Malkovris la stratabulon la urbestro grafo Enrico Palazzi-Trivelli kaj oficiale paroladis mallonge; post li parolis prezidanto de I.E.F. grafo Ademaro Barbiellini-Amidei, kaj fermis la manifestacion per malmultaj vortoj s-na Renato Pennazio. Inter aliaj ĉeestis ankaŭ multaj membroj de Estraro de I.E.F. kaj multaj komunumaj magistratoj, krom la prezidanto de Organiza Komitato de la Festo de Acidĉerizoj, grafo Francesco Vagnone; la inaŭguro estis oficiala punkto de la programo de tiu "Festo".

Post la manifestacio, preskaŭ ĉiuj ariĝis ĉe loka restoracio por komuna tagmanĝo, kie estis gastoj ankaŭ la urbestro, la Prezidanto de la O.K. de la "Festo" kaj magistrato Michele Mathis.

Jugoslavio

● **Sukcesa seminario por pedagogoj.** En organizo de la Esperanto-Ĉefkomitato por Kroatujo, komence de julio estis en Zagreb 10-taga seminario por esperantistoj-pedagogoj. Krom la element- kaj mezlernejaj instruistoj la seminarion partoprenis ankaŭ kelkaj lernantoj de porinstruistaj lernejoj. La ĉijara estis la tria seminario organizita en sinsekvo de tri jaroj de la sama organizaĵo kaj al ĝiaj laboro kaj organizo estis aplikitaj la spertoj akiritaj en la pasintaj seminarioj, tiel ke la ĉijara, laŭ la aserto de ĉiuj seminarianoj, estis modela kaj en sia labora kaj en la organiza partoj. Seminarianoj aŭskultis 15 prelegintojn, kiuj parolis al ili pri multaj temoj dum 55 instru-horoj. Ne estis traktitaj nur la pedagogiaj kaj prilingvaj temoj, sed ankaŭ ĝeneralaj pri la organizo kaj historio de la movado kaj pri la esperanta literaturo. La estraro de la seminario opinias, ke la gvidantoj de la Esperanto-kursoj en lernejoj devas posedi la ĝeneralan scion pri la movado.

La seminario ricevis sufiĉan monsubvencion de la Sekretariejo por Klerigo de Kroatujo. La solenajn inaŭguron kaj fermon partoprenis kiel gastoj la reprezentantoj de la ŝtata aŭtoritato kaj de la loka radio-stacio.

Madagaskaro

● **La madagaskara Oficejo pri Poŝtoj kaj Telekomunikoj**, decidis prove eldoni siajn komunikojn pri aperoj de novaj poŝtmarkoj de la Madagaskara Respubliko, ankaŭ en esperanto. (Krom la franca). Tiuj komunikaĵoj

estas nun sendotaj al ĉiuj fakdelegitoj de U.E.A. pri filatelo, en pagipovaj landoj.

● **Esperantista Asocio de Madagaskaro** kreis dumonatan bultenon, "Ny Esperantista Malagasy" (La madagaskara esperantisto), kies respondeculo estas S^o Rasoanaivo. Kvankam plejparte redaktita en madagaskara lingvo, tiu bulteno enhavas artikolojn en la franca kaj en esperanto.

Nederlando

● **La Anne-Frank Domo en Amsterdamo** (Prinsengracht 263) eldonis prospekton pri Internacia Junular-centro en sep lingvoj, inkluzive Esperanton.

Norvegujo

● **La filmo "Bonvenon al Oslo"**. Antaŭ kelkaj jaroj la Turisttrafika Asocio de Oslo eldonis Esperante parolantan turistfilmon pri Oslo, sub la titolo, "Bonvenon al Oslo". La filmon oni disponigis al la Filma Servo de U.E.A., Sed ankaŭ la Turisttrafika Asocio, kaj ankaŭ Norvega Esperantista Ligo, ricevis de Esperanto-organizaĵoj kaj privatuloj multajn petojn pri pruntepreno de la filmo. Al ili oni ĉiam devis respondi nur ke oni turnu sin al la Filma Servo de U.E.A. . . Kelkfoje la Turisttrafika Asocio ankaŭ pruntedonis sian arĥivan kopion.

La Turisttrafika Asocio nun konvinkigis ke la interesiĝo por la filmo estas tiel granda, ke oni decidis fari plian kopion, kiu estos je dispono por esperantistoj kaj Esperanto-organizaĵoj ĉie en la mondo. Petojn pri la filmo oni bonvolu direkti al Norvega Esperantista Ligo, Boks 942, Oslo, Norvegujo.

Pruntepreno de la filmo estas senpaga, oni pagas nur la koston de la resendo. Cetere la sola kondiĉo por pruntepreno estas ke oni plenigu demandeton pri ĉiu prezento.

Temas pri 16 mm. kolorfilmo, kies prezento daŭras 15 minutojn. Ĝi prezentas la urbon Oslo kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn el turista vidpunkto, la Esperantajn komentariojn parolas la voĉo de C. Støp-Bowitz.

Pollando

● **Novaj gvidantoj de Pola Esperanto-Asocio**. La 13-an de majo 1962 okazis

Tutpollanda Kunveno de Delegitoj de Pola Esperanto-Asocio. Dum la kunveno oni pridiskutis la agadon de la Asocio dum la lastaj 18 monatoj. Kiel la plej gravajn atingojn la delegitoj akceptis la instruadon de Esperanto en 83 diversstipaj lernejoj kaj la organizon de 5 regionaj estraroj kun salajrataj sekretarioj. Ankaŭ oni konstatis la rimarkindan kreskon de la prestiĝo de la internacia lingvo en la pola socio. Por la estonta periodo oni akceptis kiel la ĉefajn taskojn — plivastigon de la lerneja instruado de Esperanto, firmigon kaj plinombrigon de la Asocio, pluan vastigadon de konoj pri Pollando en la mondo kaj pli vastan kunlaboron kun la movado de pac-batalantoj. Dum la kunveno estis ankaŭ elektita nova Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio, kiu jene dividis la funkciojn: la prezidanto estas esperantisto-veterano-profesoro doktoro Jerzy Loth, la vicprezidantoj estas: profesoro dro Stefan Hausbrandt kaj redaktoro Jerzy Uspienski, la ĝenerala sekretario estas Zdzisław Czuba. Krome la Prezidiumon eniris: Jan Zawada sekretario, Stefan Rosłonec kasisto, Marian Dobrzyński junularo, Jan Klimek gvidanto de informa fako kaj Lech Kosieniak gvidanto de eldona fako. Ni mencias, ke nia Prezidanto prof. Loth estas fama geografo, mondvojaĝinto, membro de multaj sciencaj alilandaj Institutoj, i.a. de la Reĝa Geografia Societo en Londono kaj vicprezidanto de la Internacia Olimpia Komitato.

● **Strato Zamenhof en Bydgoszcz, Pollando**. Post dujaraj klopodoj nia grupo sukcesis nomigi unu straton de la urbo je la nomo de L. Zamenhof. La komisiono oferis du lokojn por elekto. Okaze ni proponis por la dua nomon "Esperanto", sed la komisiono rifuzis akcepti ĝin, opiniante ĝin stranga. Eble korespondaĵoj de la esperantistaro kun ekzemploj helpas al ni atingi la celon? Adreso: Prez. M. R. N. en Bydgoszcz, Pollando.

Sovetunio

● **IVa Ĉebalta Esperanta Tendaro**. De la 21a de julio ĝis la 10a de aŭgusto

en Drabeŝi, apud malgranda sed pitoreska urbeto Cesis en la ĉirkaŭaĵoj de Riga (Latvio) okazis la IVa Ĉebalta Studenta kaj Junulara Esperanta Tendaro, kiun partoprenis pli ol 300 gesamideanoj el 33 urboj de Sovetunio. Pri la brila sukceso de tiu tendaro estis presitaj bonaj artikoloj en lokaj naciaj kaj rusaj ĵurnaloj: "Riga Voĉo" kaj aliaj. Dum la tendaro estis organizitaj: granda ekspozicio de esperantaĵoj, somera Esperanta universitato, interesaj diskutoj, demonstracioj kun esperantaj standardoj, ktp. Oni devas esprimi decajn grandajn dankojn al la organizintoj de la tendaro — latvaj samideanoj, kiuj kapablis al ĉiuj partoprenintoj fari varman akcepton. La tendaron vizitis el Moskvo honora gasto — malnova amiko de la Esperanto-movado — la ambasadoro de Demokratia Respubliko Vjetnam en USSR k-do Nguen Van Kinh kun sia fileto. Dum la tendaro estis prezentitaj tre interesaj amuzprogramoj, preparitaj de junulaj delegacioj el Estonio, Leningrado, Odeso kaj aliaj lokoj.

● **La 26-an de julio 1962 en ĤARKOV (Sovetukrainio) okazis vespero, dediĉita al 75-jara jubileo de esperanto**. Riĉe ornamita salono de Domo de Sciencistoj akceptis pli ol 150 gesperantistojn kaj interesatojn. Dum la vespero la kunvenintoj aŭskultis la raporton pri la jubileo, la respondojn al iliaj multaj demandoj, la arte plenumitajn kantojn kaj recitaĵojn ukrainlingve, ruslingve kaj esperantlingve. En la antaŭsalono estis aranĝita granda ekspozicio de E-libroj, revuoj, ĵurnaloj kaj korespondaĵoj. Apartan grandan standon okupis la korespondaĵoj sole de unu esperantisto — s-no REZNIČUK, kiu vigle korespondas kun amikoj el 48 landoj.

Usono

● **La naturista klubo "Air-a-tans"** en suda Kalifornio invitis preleganton pri Esperanto al sia regula kunveno je la 28an de aŭgusto. La invito rezultigis de la dissendo de "Naturista vivo", la esperanta naturisma revuo, ankaŭ al nacilingvaj kluboj.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

OFICIALA INFORMILO N-ro 350

DELEGITOJ

Aŭstralio

Melbourne (Victoria). 1.831.000.

D: S-ro F. V. Taylor, eks-instruisto, 4/26 Faversham Rd., Canterbury, E. 7, Vic., Tel: 832791.

Nedlands. 21.000.

D: S-ro C. J. Caldera, kuracisto, 91 Smyth Road. tel: 86-2000.

Brazilo

Belo Horizonte (Minas Gerais). 694.000.

FD (Teozofio): S-ino J. Schembri, ŝtata oficistino, Av. Olegário Maciel 590. Tel: 2-5520.

Brasília (Distrito Federal). 142.000.

FD (Komerco): S-ro N. Pereira de Souza, bankoficisto, Banco do Brasil — Agencia Central, Tel: 2-0118.

Pôrto Alegre (Rio Grande do Sul). 660.000.

FD (Instruado, lingvoj): S-ro C. Boris Eston, instruisto, Av. Borges de Medeiros 929 Apto 82. Tel: 33411 (Laborejo).

FD (Stenografio: intersteno): La FD (Instruado).

Umuarama (Parana). 25.000.

D: S-ro H. G. Santos, kuracisto, Av. Rio Branco (Hospital Modelo) C.P. 54.

NIEUWE BINNENWEG 176
ROTTERDAM-2 — NEDERLANDO

FINNLANDO

Helsinki-Malmi (Uudenmaan lääni). 10.000.

VD: S-ro T. I. Haapalainen, pastoro (luter), Kunnantie 2 a A 2, Malmi. Tel: Helsinki 753340.

FD (Muziko baroka): La VD.

FRANCUJO

Privas (Ardèche). 6000.

FD (Edukado): S-ino P. Bascou-Maisonnewe, instruistino, rue de l'Esperanto.

GERMANUJO

Bonn.

FD (Bankaj aferoj): vakas.

ITALUJO

Roma. 2.000.000.

FD (Sociologio): S-ro C. Cimino, instruisto, Via dei Fiori 88-6. Tel: 286077.

SVISLANDO

Winterthur (Zürich). 80.000.

FD (Blinduloj): S-ro A. Pellanda, komercisto, Turmstr. 16. Tel: 052/22339 tage, 052/66100 libertempe.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Takala, F-ino Tuulikki, Tampere, Finnlando.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1962

446. Barbosa, S-ro Ant., Volta Redonda, 447. Pessoa, S-ro F. N. de V., Mataripe, 448. Varanda, S-ro J., Petropolis, Brazilo; 449. Rizzo, D-ro P., Palermo, 450. Viti, S-ro G., Roma, Italujo; 451. Azam, S-ro L., Tananarive, 452. Randrianasolo, S-ro G., Tananarive, Madagaskaro.

PRO VASTIGO DE LA AGADO

(Laŭ Estrara letero de 21.5.1962)

S-ro O. H. Behncken, Camp Hill, Brisbane, 25.— n.gld., D-ro C. L. Caldera, Nedlands, 15,50 n.gld., S-ro I. Grahovac, Fitzroy, 10.— n.gld., S-ro I. T. Maddern, Morwell, 43.— n.gld., S-ro J. N. Prewett, Rochester 11.— n.gld., D-ro R. G. Robbins, Manuka, Canberra, 15,50 n.gld., ĉiuj el Aŭstralio. S-ro E. T. Bordeau Rêgo, Rio de Janeiro, 15.— n.gld., S-ro M. J. dos Santos, Rio de Janeiro, 7,50 n.gld., S-ino J. Schembri, Belo Horizonte, 22,75 n.gld., ĉiuj el Brazilo. S-ro G. B. Atkinson, London, S-ro B. J. Broadway, Bournemouth, 50.— n.gld., S-ro G. M. Hayton, Horley, 10.— n.gld., Britujo. S-ro M. Feneyrol, Hyères, 75.— n.gld., S-ro G. Mohier, Evreux, 7,50 n.gld., Francujo; S-ro E. Kind, Stotzheim, 1,15 n.gld., Dipl. Ing. H. Michling, Göttingen, 9.— n.gld., S-ro E. Graf, Teufen, 7,50 n.gld., Germanujo. S-ro D. Vlahopoulos, Thessaloniki, 8.— n.gld., Greklando. S-ro C. Mar-

tinez Fernández, Sevilla, 7,20 n.gld., Hispanujo. S-ino M. Rossi, Cordenons, 10.— n.gld., S-ro L. Taccani, Milano, 10.— n.gld., Italujo, S-ro K. Deguchi, Kameoka, 7,50 n.gld., S-ro N. Esumi, Kameoka, 7,50 n.gld., S-ro E. Itto, Kameoka, 7,50 n.gld., S-ro Kawamura, Takamatu, 11.— n.gld., S-ro T. Nakamura, Kyoto, 7,50 n.gld., S-ro S. Narita, Tokio, 10.— n.gld., S-ro G. Takenaka, Nisibiwazima Aiti-ken, 3,60 n.gld., S-ro Y. Umeda, Kameoka, 7,50 n.gld., Prof. C. Cnudde, Tamatave, Madagaskaro, 26.— n.gld., S-ro T. Müller, Jörpeland, Norvegujo, 10,50 n.gld. S-ro R. J. Clarkson, Tauranga, 10.— n.gld., S-ro A. G. Wiltshire, Auckland, 10.— n.gld., Nov-Zelando. S-ro E. S. Venter, Kaapstad, Sudafriko, 8.— n.gld. S-ro A. Persson, Högnäs, Svedujo, 25.— n.gld. S-ro I.R. Ekstrand, Kelso, 18.— n.gld., S-ro A. Gabison, New York, 10,80 n.gld., S-ino S. E. Harris, Mattoon, 16,20 n.gld., S-ro L. Heilberg, San Francisco, 18.— n.gld., S-ro F. J. Kovarik, Broomfield, 18.— n.gld., S-ro P. E. Nace, Hyattsville, 36.— n.gld., S-ro K. Nell, Rochester, 18.— n.gld., S-ro J. R. Scherer, Los Angeles, 9,90 n.gld., ĉiuj el Usono.

Entute ricevita ĝis 31.8.1962 la sumo de 9.620,90 n.gld.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino C. O.

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horszistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Malongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso. Warszawa, 249m. (1205 kcs), 42.11m., 41.18m., 31.50m., 31.45m., 31.01m., 25.42m., 25.28m. P. Esperantaj disaŭdigoj, Pola Radio, Warszawa, Polando.

Ĉiutage	15.30-16.00	Sofia, 48.62m., 39.11m. P. Radio Sofia, Bulgarujo.
Dimanĉo	19.00-19.25	Sofia, 41.35m., 25.32m. P.
	23.30-23.55	Bilbao, 265m. (1133 kcs). P. Radio Bilbao, Hispanujo.
	23.40-24.00	Rio de Janeiro, 441m. (680 kcs), 60.30m. K.I. Radio Copacabana ZYP 20/27, Avenida Rio Branco 277-17, Rio de Janeiro, Brazilo.
Lundo	12.20-12.30	Bern, 48,66m., 31.46m., P. (D-ro Baur) Svisa Radio, S.O.C., Giacomettistr. 1, Bern, Svislando.
	22.40-22.55	Hilversum, 298m. (1007 kcs). P. N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
Mardo	16.50-17.00	Wien. 577m. (520 kcs). 514m. (584 kcs) 293m. (1025 kcs). 25.45m. P. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	17.55-18.10	Roma. 50.34m., 41.24m., 30.90m. P. Radio Roma, Casella Postale 320, Roma, Italujo.
Merkredo	11.00-11.30	Pjongjang. 360m. 820 kcs), 286m. (1050 kcs), 278m. (1080 kcs), 48m. I.P. Centra Radio Komitato, Pjongjang, Norda Koreo.
	12.20-12.30	Bern. Kiel lunde (D-ro Privat).
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	23.00-23.15	Guatemala, 469m. (640 kcs), 48,54m., 30.72m. I.K. Radio Nacional T. G. W., Guatemala Cd, Mezameriko.
Ĵaŭdo	06.00-06.15	Gdansk, 230m. (1303 kcs). I.K. Pola Radio, ul Uphagena 1, Gdansk-Wrzeszcz, Polando.
	08.35-08.45	Paris. 280m. (1070 kcs), 235m. (1277 kcs), 242m. (1241 kcs), 222m. (1349), K. Esperanto Office, Orleans (Loiret), Francujo.
	21.15-21.25	Bern, 48,66m., 31.46m., 25.61m., 19.60m. P. (D-ro Baur).
	22.05-22.20	Zagreb, 264m. (1135 kcs). P. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
Vendredo	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	23.00-23.20	Hilversum 402m. (746 kcs). P. V.A.R.A., Poŝtkesto 175, Hilversum, Nederlando.
	22.00-22.10	Valencia, 193m. (1379 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
Sabato	18.30-19.00	Rio de Janeiro, 375m. (800 kcs), 25.10m., K.I. Radio Ministério da Educação, Praça da República 141-A, Rio de Janeiro, Brazilo.
	21.15-21.25	Bern. Kiel ĵaude, (D-ro Privat).
	22.00-22.30	Rio de Janeiro, 214m. (1400 kcs). K. Radio Roŝuete Pinto Av. Almirante Barosso 81, Rio de Janeiro, Brazilo.

ANONCETOJ

AVERTO - Nek la redakcio, nek UEA iel ajn respondekas pri la enhavo de la anoncetoj, aŭ pri plenumado de promesoj faritaj en ili. Tio aparte koncernas poŝtmarkkolektantojn.

Nova metodo por varbado. Konvinka rezonado. 5 rpk. "Esperanto", Lund, pf. 212, Svedujo.

40 jaraĝa inĝeniero, estro de fabriko por la fabrikado de risortoj, deziras korespondantojn en Svislando, pri ĉiuj temoj. L. F. Robinson, "Riva", Hick's Common Road, Winterbourne, Bristol, Anglujo.

Okade de VII-a Nordorienta Kongreseto Esperanto (Teresina, 17/20 Januaro 1963), Esperanto-Instituto de Piauí aranĝos ekspozicion. Bonvolu sendi materialon. Adreso: Lisandro Nogueira, 964, Teresina, Piauí — Brazilo.

Bonvolu kontribui al disvastigo de Esperanto, sendante multkolorajn p.k. filatele afr. leterojn, prospektojn, afiŝojn, libretojn k.t.p. al esperanto-ekspozicio okazonta en la fino de oktobro en Uzina Kulturdomo en Oświecim. Certa respondo. Koran antaŭdankon. Adr.: Fryderyk Statyński, Oświecim 4, Smoluchowskiego 6/3, Polando.

McMullen: Pro tro oftaj ŝipŝanĝoj, korespondantoj bonvolu uzi reekspektan adreson: Meadow Spring, Walhampton, Lymington, Hants., Anglujo.

ĈAMBRO-MINNAJA POR LA DOMO DE U.E.A.

Kun grandega plezuro kaj dankemo ni anoncas ke la familio Minnaja el Romo donacis al U.E.A. la sumon de 5000.— gld. por Ĉambro-Minnaja en la Domo de U.E.A. en Rotterdam. La familio Minnaja, ĉiuj de longaj jaroj individuaj membroj de la Asocio, konsistas el S-ino Carolina Minnaja, S-ro Luigi Minnaja, ĉefdelegito de U.E.A. en Italujo kaj kun la edzino ĉefa prizorganto de la Esperanto-elsendoj de Radio-Roma, kaj la du filoj — denaskaj esperantistoj — D-ro Nicola Minnaja, ĝenerala sekretario de T.E.J.O. kaj Carlo Minnaja, unua premiito en multaj Oratoraj Konkursoj.

Ankaŭ sen tiu ĉi belega gesto U.E.A. jam senfine ŝuldas al tiu ĉi mirinda familio, kiu apartenas al la plej meritplenaj, senkompromise integraj subtenantoj de la Asocio, kaj kies ĉiuj kvar membroj per siaj grandaj talentoj, per siaj altaj ecoj de cerbo kaj koro senĉese kontribuadas al la kultura nivelo de la movado. Per tiu ĉi malavara donaco unu plian fojon la familio Minnaja montras sian solidarecon kaj grandan fidon al U.E.A. Ni esprimas al ili ĉi tie nian plej varman dankon kaj grandan respekton pro tiu ĉi donaco.

La Estraro

PACAMANTOJ !

Memoru antaŭmendi la periodaĵon "NOVA MONDO", samtempe sendante 2 : — sv. kr. aŭ egalvaloron por la kostoj. — Estas tre grave ke ĝi aperu ! Unika kaj gravega artikolaro jam anoncita ! — Cetere vidu la anoncon en la aprila numero de "Esperanto".

Adr.: Gunnar Rugland, ĉe Rönnell, Hornsgatan 89II, Stockholm Sv., Svedujo.

Oni ankaŭ povas mendi la periodaĵon, kaj ni poste enkasigos la monon.


MONDA KULTURO

La kvaronjara kultura revuo de U.E.A.
aperos meze de oktobro 1962

Jarabono 15.— n.gld. (60 steloj)

Mendu ĝin tuj !

Uzu la mendilon troviĝantan en tiu ĉi numero!



LA
INTERNACIA
AFIŝO

Kvarkolora
Moderna
Kun taŭga
blanka spaco
por naci-
lingva
teksto

Prezoj :

Formato	po	1 ekz.	0.20 gld. (0.80 steloj)
41,5 × 59 cm:	po	100 ekz.	18.— gld. (72.— steloj)
	po	1000 ekz.	165.— gld. (660.— steloj)

Formato	po	1 ekz.	0.40 gld. (1.60 steloj)
58,8 × 83,2 cm:	po	100 ekz.	36.— gld. (144.— steloj)
	po	1000 ekz.	330.— gld. (1320.— steloj)

Tuj mendu ĝin ĉe la Centra Oficejo

Uzu ĝin por via aŭtuna kampanjo

KREDO FLOROJ DINAMITO

Tri biografiaj rakontoj pri Birgitta, sanktulino en la Nordo, pri Linnaeus, la reĝo de la floroj, fondinto de la moderna botanika scienco, kaj pri Nobel, la industriulo kaj inventinto de la dinamito, kiu tamen ankaŭ iniciatis la nobelpremiojn. La libro estas originale verkita en Esperanto de la juna sveda fizikisto kaj instruisto d-ro Ernst Olsson. Redaktis G. Henriksson.

La zorge kaj plaĉe redaktita libro bonega prezentas, kiel oni povas majstri Esperanton eĉ pri sciencaj studoj. Laŭ mia opinio ĝi meritis, ke ĝi estu vaste aĉetata kaj legata. (El recenzo en Germana Esperanto-Revuo.)

80 paĝoj. Broŝ. 3.50 gld. Bind. 6.25 gld.

MALSATA ŜTONO

de Rabindranath Tagore

Tradukis el la bengala lingvo L. Sinha.

Ilustraĵoj de Sukhamoy Mitra.

La sep rakontoj kondukas la leganton en veran hindan atmosferon, foje fean kaj fantazian, kun la nebulaj pentraĵoj de revo kaj sonĝo, foje realecan, kun la premo de la lando kaj de la klimato (la pluvsezono, la riveroj), kun la peno de la homoj, la laboro de la vilaĝanoj, la fremdeco de la kasto.

(El recenzo en Heroldo).

La verko estas libro n-ro 1 en la Serio Oriento-Okcidento sub aŭspicioj de UEA.

128 paĝoj. Broŝ. 8.50 gld. Bind. 11.50 gld.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO Malmö 7

Mendu ĉe UEA aŭ via kutima libroservo.

NATURISTA ESPERANTO-REVUO ILUSTRITA

nun akirebla, dumvive aŭ jare !

La bela ilustrita revuo "Naturista Vivo", oficiala organo de INFE (Internacia Naturista Fakgrupo Esperantista), estas nun akirebla por ĉiuj samideanoj, per membreco aŭ per nura abono, dumvive aŭ jare.

INFE nun fariĝis la oficiala Esperantista Labor-Grupo en INF/FNI, la monda organizaĵo multfoje pli granda ol la tuta Esperanto-movado.

Membreco en INFE (inkl. "Naturista Vivo") kostas DUMVIVE nur 100 Stelojn, por familio aŭ sola viro; 50 Stelojn por sola virino.

Nur UNU-JARA membreco kostas 20 Stelojn.

Nura abono : DUMVIVE — 100 Stelojn; JARE — 20 Stelojn (same por viroj kaj virinoj). Egalvaloraj monbiletoj (100 Steloj = \$ 7.50) de iu ajn lando, aŭ poŝtmandato, ĉeko, k.a. estas same akceptataj.

Ekde la 1-a de januaro 1963 la kotizo plialtiĝos per 500% (5-oble), tial :

ŜPARU MONON

ALIĜU TUJ!! aŭ ABONU TUJ!!

INFE-sekretario/kasisto Leif Heilberg, 1801 Page Street, San Francisco 17, Calif., USONO